

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**TEJO pri paco
en Balkanio**



Zagrebo invitas



**Kalendaro
2000-2001**



**Ĉu Esperanto
defendas aliajn
lingvojn?**



Dudek jaroj da Afriko

Vi trovos

181 **Malfermo**

Ni kreu elektan etoson!

Osmo Buller

182 **LA AFRIKA AGADO, DUDEK JAROJN POSTE**

Kompilis GBEGLO Koffi



186 **Kongresa komuniko 1**

187 **Junularo**

Malgraŭ militoj kaj malfaciloj

Notu bone

188 **Forumo**

Tutmondiĝo: Labori angle

Dafydd ap Fergus

188 **Ĉu Esperanto helpas gardi malfortajn lingvojn?**

Bård Hekland

190 **Kalendaro 2000-2001**

192 **Recenzoj**

Sten Johansson pri Kapturnoj

Mao Zifu pri Resurekto

*Ziko Marcus Sikosek pri Esperanto:
Grammatica met oefeningen*

195 **Laste aperis**

196 **Navige tra TTT-paĝoj**



Kaj plue...

197 **Loke Foliume Persone**

Anoncetoj

199 **Influe Elekto de komitatanoj B de UEA**

200 **Forpasoj**

La kovrilo: Esperanto-kursanoj en Angolo (J. Nova M'Beta, Cabinda E-Asocio)

Desktr: Loĝanto de Nacia Parko Ein Gedi, Israelo (F. L. Veuthey)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32; USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.



NI KREU ELEKTAN ETOSON!

La gvid-organoj de UEA proksimiĝas al la fino de sia periodo. La elektojaro 2001 kulminas en Zagrebo, kie nova Komitato elektos novan Estraron por la tri jaroj 2001-2004.

Ĉiu individua membro povas jam nun aktivigi por elekti siajn novajn gvidantojn. Ĉi-numere troviĝas (p. 199) anonco pri la nomumado de kandidatoj por sep lokoj de komitatanoj B, la reprezentantoj de individuaj membroj en la Komitato de UEA.

Ĉu vi deziras fariĝi komitatano? Se jes, bv. legi en la anonco kion fari. Se ne, vi tamen povas influi la elektojn apogante la kandidatigon de iu, kiu ja interesiĝas kungvidi la Asocion kaj kiu laŭ vi estas inda por tio. Ju pli da kandidatoj, des pli interesa balotado nin atendos.

En 1998 la elektoj estis vere viglaj: voĉdonis 2328 membroj, t.e. 33,6%. Neniam antaŭe balotis tiom da membroj. Tiun entuziasmon influis kvankam ne plene klarigis relative granda nombro da kandidatoj (15). En 1989 ĝi estis 16, sed "nur" 1709 voĉdonis.

La aktiveco en 1998 respegulis la bonan etoson en Esperantujo, kiu rezultis el la lanĉo de la Manifesto de Prago. Tiu bonega teksto, kiu ankoraŭ longe retenos sian aktualecon, estis la fajrero kiu necesis por reveki la motivigon de ni ĉiuj, kontuzitan pro la battoj kiuj antaŭ deko da jaroj paralizis la fortan movadon en

Meza kaj Orienta Eŭropo. La Manifesto estis verkita por klarigi al la ekstera mondo "Kio ni estas kaj kion ni celas?". Ĝi efektive pruviĝis tre bona informilo pri Esperanto, sed neniuj antaŭvidis, ke ĝi tiom efikas ĉe la esperantistoj mem, kiuj en la tiama konfuzo serĉis klarecon pri sia esperantisteco. Ke la Manifesto ricevis tian funkcion, estas io aparte interesa, kaj tion ne komprenas tiuj kiuj kritikas tiun aŭ jenan vortumon aŭ mankon en ĝi aŭ eĉ tute bagateligas ĝin.

Kiam ni ekvoĉdonos pri novaj komitatanoj B, la Praga Manifesto aĝos preskaŭ kvin jarojn, tiel ke ĝi ne plu estos sufiĉe freŝa por akceli la balotemon. Ni do provu inversigi la influ-direkton klopodante fari la elektojn kiel eble plej viglaj kun la espero ke ili fariĝu katalizilo por pli vigla aktiveco ĝenerale! Ni kreu veran atmosferon de elektoj.

Pri la unua paŝo zorgu la kandidatemoj. Antaŭe ili kolektis la necesajn apogantojn diskrete kaj silente nur en sia propra rondo. Nenio malpermesas inviti apogantojn en Interreto, en gazetoj, en Esperanto-aranĝoj. Kaj kiam oni estos kandidato, oni reklamu sin laŭte, eĉ per pagitaj anoncoj. Oni ankaŭ ne timu publike demandi al la nunaj komitatanoj kaj estraranoj, kion ili fakte faris. Balotkampanjoj estas parto de demokratio. Tiel estu ankaŭ en UEA.

Osmo Buller



Gbeglo Koffi: "La afrika"

La afrika agado, dude

Kompilis GBEGLO Koffi

La jaro 1980 estis turnopunkto en la historio de la afrika E-movado. La 20-a datreveno donas okazon por rerigardi kaj danki – sed ankaŭ por rigardi antaŭen kaj plani.

En Afriko, la historio de la Esperanto-movado havas du periodojn: antaŭ la jaro 1980, kaj ekde la 15-a de septembro 1980, kiam la nederlandano Hans Bakker fariĝis ĝia ĉefrolanto, kiel komisiito de UEA pri Afriko. Dudek jarojn poste, necesas fari bilanceton kaj prognozon por venontaj jaroj.

Kion Hans Bakker povas diri pri dudek jaroj da Afrika Agado? Demandite, li skribis i.a. jenon:

“La 65-a Universala Kongreso okazis en Stokholmo, Svedujo, en 1980. Mi ĝin partoprenis, havanta 42 jarojn. Tiam, jam kvin jaroj pasis de kiam mi forlasis la agadon en TEJO, la junulara asocio, en kiu mi fondis en 1965 kaj longe gvidis la eksteran agadon. Tiun eksteran agadon karakterizis de post la jaro 1969 la Deklaracio de Tyresö. En 1969 TEJO akceptis ĝin en la 25-a IJK en la sveda urbo Tyresö. Ĝi forte impresis min kaj aliajn. Ĝi substrekis la egalecon de lingvoj kaj kulturoj en la mondo, ankaŭ tiujn de malgrandaj aŭ malfortaj nacioj kaj popoloj. Dum la tuta periodo de 1969 ĝis 1975 mi vivis en tiu etoso, gvidante la Komisionon pri Eksteraj Rilatoj de TEJO.

En 1980 Renato Corsetti, tiam UEA-estrarano pri regiona agado, gvidis kunsidon en la Stokholma UK. La salono estis plenplena, multaj devis stari. Regis eksterordinara etoso. Li tiel entuziasmigis la ĉeestantojn ke pluraj promesis aktivigi sur la kampo de regiona agado, t.e. en regionoj kie UEA



Ciel fotoj: Arkivo de UEA



**Ganaa-Svisa
geedziĝo, 1998**

**Membroj de Junulara Esperantista
Organizo de Madagaskaro, 1967**



ne jam havis landajn asociojn. Tiu promeso ŝanĝis ankaŭ mian vivon. Tia aktivado estis parenca al la agado kiun mi faris tiel longe en TEJO. Afriko estis/estas kontinento kun multaj

movado bezonas ordiĝon"

k jarojn poste

junuloj, s-ino Helga Farukuoye, s-roj Marcel Delforge, Nino Vessella, Christopher Fettes kaj pluraj aliaj."



Norda E-Klubo, en Niĝerio, konsistas el divers-etnaj anoj. Dekstre, Hans Bakker



En sia nederlandlingva verko "La Esperanto-movado en Afriko, kun precipa atento al Tanzanio kaj Togolando" (1999), per kiu ŝi akiris la licencian diplomon pri afrikaj lingvoj kaj kulturoj en la Universitato de Gent, Heidi Goes skribis jene (p. 44 k.s.):

Ĉe Svalandanda E-Centro

ceptis la taskon propagandi Esperanton el Eŭropo en Afriko, li frontis pesimismen ĉe eŭropanoj kiuj memoris la 'Karavanon de amikeco' — kampanjon kiu postlasis malmultajn spurojn. Ili diris ke afrikanoj rapide perdas sian interesiĝon.

Sed li persistis kaj varbis kunlaborantojn kaj proponis korespondajn kursojn. La maniero estis malsama en orienta kaj okcidenta Afriko, sed la sukceso estis same granda. Homoj komencis entuziasme la studadon. Tiu miriga diferenco de interesiĝo en Afriko kaj Eŭropo estas kaŭzita, laŭ la supozo de Hans Bakker, de la deziro de afrikanoj ligi rilatojn kun la riĉa, blanka parto de la mondo, sed ankaŭ de la deziro ekkoni la vastan mondon. La komenco do estis facila, sed poste ne plu, ĉar ne ĉiuj havis la talenton por plustudado, kaj multaj komprenis ke Esperanto ne kondukas al rapida riĉiĝo."

Heidi plu skribas pri la internacia korespondado, la ĝemeliĝoj inter kluboj en kaj ekster Afriko, la *Bulteno por Ĝemelantoj*

kaj *Korespondantoj*, la gazetoj *Esperanto en Afriko* kaj *Orientafrika Stelo*:

"Post ses jaroj kelkaj dekoj da afrikaj lernantoj bone sciis Esperanton. [...] Alvenis la jubilea kongreso de 1987. Hans Bakker profitis tiun okazon por inviti 13 esperantistojn al tiu jubilea, grandioza UK en Varsovio. En tiu tempo eŭropaj registaroj donis ankoraŭ vizojn por vizitantoj, kaj la noveco de la afrika agado ankaŭ elvokis sufiĉajn donacojn de esperantistoj por ebligi la vojaĝojn.

La gastoj venis unue al Budapeŝto, kie Hungara E-Asocio gastigis ilin en kvinsemajna instruseminario pri la Csehmetodo. HEA tiutempe ricevadis ankoraŭ grandajn subvenciojn de la hungara ŝtato. Poste la dektriopo vizitis la TEJO-kongreson en Krakovo kaj la Universalan Kongreson en Varsovio. Tiam ili disiris: iuj restis en Pollando, aliaj veturis al Svedujo, Francujo, aŭ al Kultura Festivalo en Jugoslavio, antaŭ ol reveni al siaj hejmoj en Afriko. La eĥo estis granda. Multaj E-gazetoj publikigis artikolojn kaj fotojn."

riĉaj kulturoj, minacataj de la influo de grandaj potencoj eŭropaj kaj usona.

Renato Corsetti donis al mi sian sliparon. En ĝi mi trovis la nomojn kaj adresojn de kelkaj dekoj da afrikaj esperantistoj. Ekzemple de s-roj Mboge Mbele (Kamerunio), Ngangu (Kongolando), Rabevazaha kaj Raveloson (Malgasio), Sao (Tanzanio). Kun ili mi ekkorespondis. Tuj ekhelpis min s-ro Germain Pirlot (Belgujo) kiu sendis leterojn al afrikanoj anoncintaj en la revuoj *Bingo* kaj *Jeune Afrique* sian deziron ekkorespondi kun eksterlando. Multaj el ili reagis al la letero, kiu promesis senpagan kurson — la faman kurson FERREZ, kies restintan stokon donacis al mi s-ino Ferez, la vidvino de la verkinto. Nomoj de diversaj kunlaborantoj el tiu periodo revenas en mian memoron: s-ino Andrée Orsolini (Belgujo, 1920-1986), kiu redaktis la bultenon *Esperanto en marche* kun afrika suplemento, ŝia samlandanino Lucy Leroy (1911-1992), kiu transprenis tiun taskon post ŝia morto, s-ino Els Kervers (Nederlando), kiu konstruis rilaton kun multaj niĝeriaj

Kaj tiel plu. Ne eblas ĉion rakonti. Restu kelkaj linioj por rigardi antaŭen.

Nuntempe la afrika agado travivas novan evoluon. Pro sia enoficiĝo en la estraro de UEA, Gbeglo Koffi povas vastigi sian gvidan rolon de Togolando al Afriko. La uzado de retroŝto ebligas intensecon de agado ĝis nun neeban. Li iniciatis Afrikan Komisionon ĉefe por ligi aktivulojn en tuta Afriko pli forte kun UEA. Jam nun rimarkeblas la rezultoj de liaj klopodoj komprenigi pli bone en UEA kia estas Afriko kaj en Afriko kia estas UEA. Samtempe la malkresko de donacoj estas kontraŭbatalenda.

Kiel karakterizi la lastatempan evoluon? Afriko fariĝas pli kaj pli integra parto de la tutmonda E-movado, kaj samtempe ĝi pli kaj pli spertas ke tio estas malfacila pro la manko de monrimedoj. Kreskas la kompreno. Samtempe kreskas la malfacilaĵoj en la afrikaj landoj mem, ekonomiaj kaj kulturaj. Pli ol antaŭe necesas kunigi la (malmultajn) fortojn en kaj ekster Afriko. Gbeglo Koffi preskaŭ ĉiutage luktas por forigi la kverelojn inter afrikaj aktivuloj. Estante afrikano, li pli bone komprenas tiun fenomenon ol eŭropano.

Ni devas konscii pri nia historio, sed ankaŭ pri nia esenteco. Pasis unu generacio de post 1980. Alia transprenos. Kion ĝi skribos en la jaro 2020?

Tiu ĉi respondo tute ne montras la konstruanton de tiu agado. En sia raporto Hans Bakker menciis Renaton Corsetti, kiu vekis lian intereson pri tiu laboro. La nuna vicprezidanto de UEA, iama estrarano pri regiona agado de UEA, verkis enkondukon al la libreto *Dank' al Hans Bakker*, per kiu afrikanoj esprimis siajn dankojn al Hans. En tiu libro Renato skribis:

“Estas vero ke pluraj afrikanoj estis pretaj lerni Esperanton. Estas vero ke pluraj afrikanoj sopiris je io tia. Estas vero ke la esperantista komunumo estis preta helpi

en pluraj formoj, de instruado al donacado. Sed estas ankaŭ vere ke temis ĉefe pri unu-homa batalo.

Kaj tiu unu homo estis Hans Bakker. Kiam li transprenis la afrikan Agadon antaŭ 20 jaroj, jes estis pluraj ideoj pri la neceso disvastigi Esperanton en Afriko, sed mankis la homo kiu praktike faru tion. Hans estis tiu homo.

Ankaŭ aliaj, inkluzive de mi, provis fari lian laboron, kaj en Afriko kaj en aliaj mondopartoj, sed ni ĉiuj eĉ ne alproksimiĝis al liaj rezultoj. Kial? Kiu estas lia sekreto? Lia sekreto estas amo. Li kapablas kun-senti kun la lernantoj, kaj li tre bone komprenas kiam aliaj pli gravaj zorgoj fortenas onin de la lernado de la lingvo. Se via filo malsanas, evidente vi havas neniun intencon plufari la hejmtaskojn kaj batali kontraŭ la akuzativo. Vi bezonas amikon kiu laŭeble helpu vin pri la malsano. Tion Hans komprenis. Li provis helpi la homojn pri la problemoj



Ĉiuj fotoj: Arkivo de UEA

Benino: Tuta vilaĝo ekverdiĝas

Unu el la plej gravaj kriterioj por disvolviĝo de iu ajn lando estas ke ĝiaj civitanoj kapablu konscii pri siaj veraj bezonoj kaj daŭre klopodu atingi tiun celon antaŭe klare difinitan. Tio pli eblas kaj facilas ĉe homoj kiuj kapablas legi kaj skribi.

Al tio kontribuas, de oktobro 1999, lernejo en la benina vilaĝo Codji (vidu majo, p. 88), kies fondiĝon ege helpis e-istoj, precipe el Stuttgart (Germanio). “Esperanto” estas nun vorto ĉiutage prononcata eĉ de la analfabetaj anoj de Codji. La infanoj eklernis E-on dum unu horo semajne, kaj lastatempe transiris al 2-3 horoj semajnaj. Pli ol gramatika superŝuto helpas ilin kantado, dank’ al surbendigitaj kantoj, kiujn sendis i.a. Anny Hartwig, Gisela Passarella, Atilio Orellana Rojas kaj Katalin Smidélusz. Senĉese helpas ankaŭ Jules Verstraeten, per lerniloj ĉiuspecaj. Aliaj sendas monon, skribilojn, pupojn, kajerojn... Ni premias per ili ne nur la plej diligentajn lernantojn, sed ankaŭ la tutan lernejon. La 7-an de julio okazis la premio-ceremonio: la infanoj ricevis skribilon, liniilon, biskvitojn, kaj 60 el ili ankaŭ uniformon (el po du metroj da ŝtofo por infano).

Ekde oktobro 2000 du aliaj lernejoj en la sama regiono aldoniĝas al la projekto enkonduki la instruadon de Esperanto. Informas:

Jean Codjo (Esperanto-Afrik’, 03 BP 3589 Cotonou, Benino; esperantaf@firstnet.bj) kaj Martin Schaeffer (esperantist@aol.com).

Afrika Oficejo

La Afrika Oficejo (AO) estas tio por la afrika Esperanto-komunumo kio la CO estas por la tutmonda komunumo de Esperanto. AO funkcias kiel la administra centro de la afrika E-movado.

La taskoj de AO interalie estas:

- kunhelpi, kunordigi kaj kunapogi la laborojn de UEA por/en Afriko;
- starigi statistikon, kolekti kaj konservi arkivojn kaj bibliografiajn dokumentarojn pri la afrika movado;
- redakti kaj laŭeble dissendi informan bultenon pri la movado en Afriko;
- eldon(ig)i verkojn, periodaĵojn, varbfoliojn kaj aliajn informilojn de/por afrikanoj;
- proponi diversajn servojn al afrikaj esperantistoj: korespondadon, ĝemeligon, helpon en organizado de kursoj/kongresoj ktp.
- reprezent(ig)i la tutmondan E-komunumon ĉe la afrikaj instancoj kaj la afrikan E-komunumon ĉe UEA kaj ĉe afrikaj instancoj.

La laborojn de AO prizorgas afrikanoj-esperantistoj, kiuj ricevas honorarion. La nombro de la laborantoj dependas de la laboro farenda. La prizorgantoj inter si dividos la taskojn kaj respondecojn. AO troviĝas en Togolando, kaj povos translokiĝi al alia lando. Ĝi nun uzas la sidejon de TIETO en la ĉefurbo Lomé: Afrika Oficejo, B. P. 13169, Lomé, Togolando; ☎+228/272-117; ☎261-066; ✉esp.togo@cafe.tg aŭ ✉afrika.oficejo@lycos.com.

kiujn ili havis. Kaj tiuj homoj, kiam la problemoj finiĝis, revenis kun pli da entuziasmo al la batalo kontraŭ la akuzativo.

Ni konsciu kiom la tuta Esperanto-movado ŝuldas al li. Mi ne pensas ĉefe pri la afrika movado, sed pri la tutmonda movado, kiu sen Afriko malhavas la rajton nomi sin tutmonda, kia prave ĝi aspiras esti.”

De supre: Restoracio de e-istoj el Dar-es-salamo, Tanzanio. Esperantistoj kunvenas kadre de Kampanjo 2000 en tanzania rifuĝejo. Sepa Togolanda Esperanto-Kongreso.



Kiam Hans eklaboris, estis en Afriko dekoj da esperantistoj. Nun, de 1980 ĝis 2000 multo ŝanĝiĝis. Okazis naciaj kaj tutaafrikaj kongresoj en Afriko. En multaj landoj afrikaj estas centoj da esperantistoj. Afrikanoj verkis artikolojn por diversaj periodaĵoj kaj eĉ nutris la E-literaturon per siaj verkoj. Multajn UK-ojn partoprenis afrikanoj, kaj ankaŭ eksterafrikanoj vizitas kongresojn en Afriko. Se paroli pri la movado en unuopaj landoj, necesas citi la agadojn ekzemple en:

- **Benino**, kie okazis la dua afrika kongreso en 1991. Funkciis landa asocio, sed intertempe ĝi iomete dormis; la kluboj tamen vigle funkcias. La nunaj klopodoj de Jean Codjo (vidu p. 184) donas novan impulson al la movado.

- **Demokratia Kongolando**: okazis en 1999 tutlanda renkontiĝo de la landa asocio DKEA. Apud tiu ĉi funkcias la grupo EKM de Émile Malanda, kiu agadas inter studentoj. Konga E-Rondo de Ferdinand Kinkani aktivas ĉefe en E-turismo. Ĝi ĵus propagandis E-on antaŭ internaciaj instancoj deĵorantaj en Kongolando.

- **Kamerunio**: Jean Balaga, Herman Nyeck Liport, Victor Nto Nto, N. Z. Chamberline, Patrice Tonga funkciigas la landan asocion AEK. Ili havas grandan respondecon: klopodi unuigi ĉiujn kameruniajn esperantistojn.

- **Malagasio**: Funkcias du landaj asocioj. MEU, kiun prezidas Justine Ralalarisoa, ĵus okazigis sian unuan nacian kongreson, dum MEA, prezidata de Désiré Rabevazaha,

aranĝis interim-sulan kongreson. Klopodoj estas nun farataj ke regu en Malagasio nur unusola landa asocio. La regula aperado de la periodaĵo *Inter ni* de Universala Kultura Servo (gvidata de Eugène Ravelo-

son) informas ne nur pri E-o en Malagasio sed ankaŭ pri la malagasia kulturo ktp.

- **Sud-Afriko**: Johano Hammes, Oscar Sher, Johano Kohler, Axel von Blotnitz, Colin Beckford k.a. kampanjas por disponigi la lingvon al pli da junuloj. La kongolandano Elise By'elongo aktivas en klubo de Durban.

- **Tanzanio**: la nuna agado koncentriĝas en rifuĝejoj. Nduelb W'Aeliese kaj Mudole B. Guerchom gvidas Esperanto-klubojn en pluraj rifuĝejoj. La grupo de Ambroise Polle helpata de la klubo de Lund (Svedujo) ĵus ekhavis propran ejon, kio estas granda atingo de la klubo.

- **Togolando**: en decembro okazos la 8-a nacia kongreso. La sepa (vidu feb., p. 28) estis regiona, ĉar ĝin partoprenis e-istoj el la najbaraj Ganao, Benino, Burkino, Niĝerio kaj Ebura Bordo. Menciindas ke la togolandanoj inaŭguris la vicon de afrikaj kongresoj per la unua en 1990. Pro la sindonemo de tieaj esperantistoj la afrika oficejo de UEA nun funkcias en la ĉefurbo Lomeo. Ĝin prizorgas Raoul Hounnake kaj GBEGLO Koffi, kun la helpo de SAGBADJELOU Kokou, AFANTCHAO-BIAKOU Yao kaj ATTIOGBE-AGBEMADON Mensah. Okazas ĉiujare kursoj diversaj, internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, nacia kongreso ktp. En 1999-2000 okazos regule radi-elsendoj pri/ en Esperanto ĉe la privata radiostacio Delta Santé de la urbo Aného.

En aliaj landoj — kiel **Ganao**, **Ebura Bordo**, **Niĝerio**, **Senegalio** — klopodoj por antaŭenigi la movadon ne mankas. La ekfunkciado de la landa asocio ENEF en Niĝerio, dank' al klopodoj de Princo Henriko, Attah Evaristus, d-ro Kunle Kamson k. a. estas promesplena.

La afrika movado bezonas ordiĝon. Tiucele naskiĝis en la Berlina UK deklaro cele al bona funkciado de la E-movado en Afriko. Ordigo sole ne sufiĉas, necesas labori laŭ difinita plano. La programo Prioritato Afriko montras punktojn kiuj, efektivigite, progresigos la movadon en Afriko. Unu el la punktoj de tiu plano estas la dispono de konstanta kapitalo, kies rentoj nutros Afrikan Fondaĵon. Donacoj de Etsuo Miyoshi, William R. Harmon kaj Renato Corsetti inaŭguris la nedisponblan kapitalon de Afrika Fondaĵo.

Aparte Renato Corsetti estas ĉie(s)-ulo, kiu spronas ankaŭ la Afrikan Komisionon al pli da laboroj. Kia Hans Bakker por Afriko, tia estas Renato Corsetti por la tutmonda E-movado. Tiajn homojn bezonas Esperanto por atingi ĉiujn angulojn de la mondo. Dankon al ĉiuj kiuj kontribuis, kontribuas kaj kontribuos al la Afrika Fondaĵo, por ke tiu ĉi disponigu monon por la funkciigo de la movado en Afriko. ★

86^a Universala Kongreso de Esperanto

Zagrebo,
21-28 julio 2001



Alta Protektanto

La prezidento de Respubliko Kroatio, Stjepan Mesić akceptis esti la Alta Protektanto de la 86-a UK, enirante tiel la riĉan liston de ŝtatestroj en tiu funkcio kaj simbolante la vastan subtenon al Esperanto en Kroatio.

Poŝtmarko

La kroata poŝto omaĝos la 86-an UK per porokaza poŝtmarko, la unua UK-rilata poŝtmarko de post la Havana UK en 1990.

Kongresejoj

Oni kongresos paralele en du lokoj: la eleganta koncertejo “Vatroslav Lisinski” kaj la proksima Elektroteknika Fakultato. Kelkaj programeroj okazos ankaŭ aliloke.

Vizoj

Indas jam nun esplori ĉe la plej proksi-

ma kroata ambasado/konsulejo kiuj vizo-kondiĉoj validas por oniaj lando kaj kazo. La kondiĉoj povas rapide ŝanĝiĝi. La aliĝintoj kiuj bezonos vizon, ricevos oficialan invitilon.

Kongresa Universitato

La rektoro de la 54-a IKU estos akademiano Dalibor Brozović. Prelegemuloj bv. noti la limdaton por kandidatiĝo: 15-a de januaro 2001.

Loĝado

Zagrebo abundas je altklasaj hoteloj kun relative moderaj prezoj (40 ĝis 120 EUR). Studentaj loĝejoj, sufiĉe proksimaj al la kongresejoj kaj kun komforto de 2- kaj 3-stelaj hoteloj, kostos 20 ĝis 40 EUR. Estos ankaŭ malpli kostaj loĝeblecoj por grupoj kaj gejunuloj (detaloj ĉe la CO). Plenaj informoj kun mendiloj troviĝos en la Dua Bulteno.

Ekskursoj

Oni antaŭvidas tri antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn, ĉefe laŭ la rava marbordo: Istrio kaj Kvarnero, Meza Adriatiko kun arkipelago Kornati, Suda Adriatiko kun Dubrovnik. Inter la tuttagaj ekskursoj elstaras la famegaj Lagoj de Plitvice, Kumrovec (la naskiĝloko de Tito), la montara Zagorje-regiono kaj la cikonia vilaĝo Ĉikoš.

Junulara programo

Interesitoj kaj amasloĝemuloj kontaktu la lokan prizorganton: Irina Baraĉ, Ozaljska 112, HR-10000 Zagreb (irina.barac@yahoo.com aŭ ibarac@inet.hr; ☎+385-1-363 5564, portebla ☎+385-98-414168).

Infana Kongreseto

IIK akceptos E-lingvajn infanojn 6-13-jarajn. Ĝis la jarfino validas aparte favoraj kotizoj. Bv. kontakti Stefan MacGill (Bethlen u. 2, HU-2030 Erd, Hungario (stefan.macgill@galamb.net) aŭ peti informilon ĉe la CO.

Dua Bulteno

Dua Bulteno, kun detaloj pri ekskursoj kaj loĝeblecoj kaj kun aliaj utilaj informoj, aperos januare. Ĝin ricevos nur la aliĝintoj.

Materialoj

Kolora afiŝo haveblas ĉe LKK kaj ĉe la libroservo de UEA por 2,70 EUR. Por mendoj ĝis 5 ekz. aldoniĝas afranko de 5 EUR. Ĉe UEA estas mendeblaj ankaŭ belaj glumarkoj (1,20 EUR por 10-marka folio). La Unua Bulteno kaj urba prospekto riceveblas laŭpete senpaga ĉe UEA.

Aliĝoj

Ĝis la 20-a de oktobro estis 325 aliĝoj el 40 landoj. Kvankam la unua granda aliĝ-ondo venos jarfine, la pintaj landoj verŝajne jam nun distingiĝas. Apud Kroatio (26) temas pri Germanio (33), Japanio (16), Nederlando (15), Francio (14), Brazilo (13), Italio (11) kaj Pollando (10).

Kotizoj

Ĝis la jarfino validas jenaj kotizoj: Individua membro de UEA (IM): 120 EUR [landoj de tarifo B: 90]; ne-IM: 150 [112]; junulo/kunulo/handikapito/komitatano: 60 [45]; samaj kategorioj por ne-IM: 90 [67]. Por landoj de iama Jugoslavio (krom Slovenio) validas aparta tarifo.

Malgraŭ militoj kaj malfaciloj

De 1 ĝis 8 septembro 35 gejunuloj el 17 landoj seminariis en Varna (Bulgario) pri "Balkana junulara agado por kulturo de paco".

Ne nur E-parolantoj, sed ankaŭ aktivuloj de aliaj neregistaraj junularaj organizaĵoj partoprenis la seminarion: por ili estis organizita lingva trejnado. Bedaŭrinde pro vizaj problemoj pluraj gejunuloj, precipe el ekster Eŭropo, ne povis alveni en Bulgarijon.

Al la temo kontribuis d-ro Valerij Stojanov, vicdirektoro de la Instituto pri Historio ĉe la Bulgara Nacia Akademio de Sciencoj, per prelego pri historio de balkanaj etnaj rilatoj. Ljubomir Trifonĉovski parolis pri la balkana kultura kunlaboro, ankaŭ kadre de Esperantio. La regionan kulturon eblis ekkoni i.a. per la filmo "Kapra korno" kaj dum balkana vespero, sed Eksterbalkanio kaj E-kulturo estis same eroj de la vespera programo.

Ankaŭ eksterprograme eblis informiĝi pri la nuna situacio en Balkanio — de la 19 seminarianoj kiuj estas mem balkananoj. Interalie ni eksciis kiel sentiĝis dum la bombado, kiel gejunuloj balkanaj vidas sian situacion kaj kiajn esperojn ili havas. Ĝojigis aŭdi ke malgraŭ ĉiuj militoj kaj malfacilaĵoj — pri kiuj la amaskomunikiloj ofte

raportas — la junaj esperantistoj, kaj laŭdire junuloj ĝenerale, bone interrilatas kaj respektas unu la alian sen depende de etno, religio kaj kulturo.


Krom la temo, ankaŭ TEJO-aferoj kaj aktivula trejnado ricevis multe da atento, des pli ke partoprenis preskaŭ la tuta estraro. Nun mankas fortoj en TEJO pri multaj aferoj, kaj tial gravas trejni novajn aktivulojn.

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) ricevis novan kunordiganton: Hokan Lundberg, kaj multaj partoprenantoj montris grandan interesigon kunagadi en KER. Lundberg povos kalkuli ankaŭ kun la helpo de la "dinsaŭra klubo": spertaj (eks)aktivuloj, kiuj ne plu volas aŭ povas (ekz. pro aĝlimo) agadi en TEJO, sed volonte donas plu konsilojn.

Pri la seminario oni povas mendi raporton de tejo-oficejo@esperanto.org kaj baldaŭ vidi informojn kun bildoj ĉe <http://www.esperanto.org/tejo>.

La venonta TEJO-seminario (25 marto - 1 apr., Budapeŝto) temos pri "La lingva ĉielarko — ponto al kulturaj trezoroj".

Laŭ raportoj de Hokan Lundberg, Sabira Ståhlberg kaj Sjoerd Bosga



Notu bone

EPĈ: PLEDU POR PLUELDONO

La populara revuo El Popola Ĉinio anoncis ke ĝi ĉesas aperi en papera formo (okt., p. 164).

La vicprezidanto de UEA, Renato Corsetti, alvokas:

"Ĉar dum 50 jaroj EPĈ farigis tre konata kaj ŝatata inter e-istoj, mi petas ĉiujn abonantojn kaj ŝatantojn de tiu revuo skribi al la ĉina ambasadejo en sia lando por esprimi sian bedaŭron kaj sian deziron plu ricevi la revuon.

La letero estu pozitive vortumita, t.e. ĝi emfazu la altan kvaliton de la revuo, ĝian utilecon por ekkoni Ĉinujon kaj la ĝeneralan ŝaton de la legantoj. Oni esprimu la deziron ke la kompetenta registara instanco repripensu la decidon kaj ebligu pluan aperon de papera EPĈ."

MANIFESTO 2000:

UEA EN LA MONDA PINTO

Inter ĉiuj neregistaraj organizaĵoj UEA troviĝas sur la 14-a loko en la monda statistiko de kolektantoj de subskriboj por Manifesto 2000. Ĝis la 10-a de oktobro pli ol 60 milionoj da homoj donis per sia subskribo apogon al tiu dokumento, iniciatita de grupo de Nobel-premiitoj pri paco kadre de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco. Duono de la subskriboj estis kolektita de Monda Spirita Universitato Brahma Kumaris. Pli ol unu milionon atingis ankaŭ Monda Federacio de Unesko-Klubo, -Centro kaj -Asocioj.

La kolektado de subskriboj plu daŭras. Oni povas subskribi ĉe www.uea.org/2000.html aŭ per letero al la CO de UEA (adreso en la kolofono). Eblas ankaŭ ricevi senpage faldfoliojn kun la teksto de Manifesto 2000 kaj kupono por subskribo. Esperanto-gazetoj estas petataj represi la tekston de la Manifesto kun la kupono aŭ dissendi la faldfoliojn kune kun sia proksima numero.

LIBRO DE AMO

"Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: €6,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Tutmondiĝo: Labori angle

En ekonomio la tutmondiĝo atingis novajn rekordojn. Milionoj da dungitoj nun laboras por internaciaj grupoj nove kunigintaj. En la venontaj jaroj iliaj laborkondiĉoj funde ŝanĝiĝos. Milionoj da homoj devos rapide lerni la anglan por respondi al la defioj en novaj internaciaj firmaoj kaj por konkurenci en merkato tutmonda.

La unuaj ses monatoj de 2000 estis vere nova jarmilo por la komerca mondo. Laŭ konstato de internacia komerca konsult-firmao, KPMG, kiu studis 3310 internaciajn fuziojn, la totala valoro de kunigitaj firmaoj altiĝis al 643 miliardoj da usonaj dolaroj en tiu periodo. Tio estas 60% pli ol en la antaŭaj ses monatoj. Evidente, la fenomeno multe pli koncernas Eŭropon: je valoro de 352 miliardoj da dolaroj, ĉ. 55% de la tutmonda totalo. En 1999, laŭ valoro 73% de la fuzioj okazis en Eŭropo, plejparte inter eŭropaj firmaoj. “La sekva defio estas unuigi ĉi tiujn grandegajn kombinaĵojn sufiĉe bone por altigi la valoron por akciuloj” — diras David Beaver, prezidanto de KPMG. La konsultfirmao avertas ke pli ol ok el dek fuzioj malsukcesas atingi altigon de valoro. Kulturaj faktoroj estas unu el la plej grandaj problemoj por la novaj firmaoj, specife en Eŭropo.

Sveda kasisto, franca ĉefo

“Vere tutmonda socio povas esti atingita nur per vera kompreno” — klarigas la prezidanto de Aventis, Jürgen Dormann (prezidinto de Hoechst), kaj Aventis-vicprezidanto Jean-René Fourtou (prezidinto de Rhône-Poulenc). Aventis estis la grupo kuniginta el la germana Hoechst kaj la franca Rhône-Poulenc. En 1998 Hoechst-firmaoj

dungis preskaŭ 100 000 homojn tutmonde, plejparte en Germanio. En 1999 Rhône-Poulenc havis 65 180 dungitojn: 44% en Francio, 18% en aliaj eŭropaj landoj, 18% en Kanado kaj Usono, 7% en Brazilo. En internacia grupo komuna lingvo estas esenca por bona kontrolado kaj funkciado. Sveda kasisto, ekzemple, devas kompreni la notojn de franca ĉefo. Pro tio internaj dokumentoj devas esti en komuna lingvo.

Dormann kaj Fourtou diras: “Por evoluigi nian grupan kulturon ĉe Aventis, lingvo estas esenca. Ni dependas de la angla kiel internacia komerca lingvo por funkciigi niajn tutmondajn procesojn kaj projektojn” (vidu <http://www2.aventis.com/forum/fut0002/fut0002.htm>). Multaj el la pli ol 150 000 dungitoj rapide devas lerni la anglan. La internacia lingvo estas eĉ pli grava por la ĉefoj kaj subĉefoj vokitaj labori eksterlande. En 1998 pli ol 500 ĉefoj diversnaciaj havis eksterlandan postenon ĉe Rhône-Poulenc. En la novaj firmaoj multe pli da dungitoj devos akcepti postenom eksterlande. Pro tio estas esence ke la manaĝeroj bone regu la anglan. Ankaŭ por la miloj da Aventis-esploristoj la angla, kiel internacia lingvo de scienco, fariĝis grava por iliaj karieroj.

Germanoj angle al germanoj

Ĉe Siemens, kun 443 000 dungitoj en 190 landoj, la angla iĝis fundamenta parto de la korporacia kulturo. “Ni parolu kaj skribu la anglan. Pli ol 60% de niaj dungitoj laboras en aliaj landoj. Ofte alilingvanoj devas legi niajn raportojn” — diras germana ĉefo kiu laboras en Belgio. “Tamen estas tute ridinde ke ni germanoj devu skribi angle al germanaj kolegoj en Germanio. Estas tiom stulte fari tion kiam nur germanoj legos la raportojn. Tia estas la lingva politiko de la

firmao.” Grava por Siemens en la elektado de novaj dungitoj, krom bona faka kono, estas bona regado de la internacia lingvo. “Bona angla estas la bazo por antaŭenigi en tutmonda ekonomio” — klarigas la TTT-ejo de Siemens.

DaimlerChrysler havas 466 938 dungitojn tutmonde, el kiuj 101 777 en Germanio. Laŭ dokumentoj de la firmao, kies oficiala lingvo estas la angla, tiuj kiuj ne sukcesas regi la anglan, ne havu malpliajn ŝancojn de kariero. “Tamen en la estonteco, kaj specife por manaĝeroj, kono de la angla estos pli grava kriterio por la elektado de laborlokoj.”

Minoritatoj senreagaj

Ekonomia angliĝo ne renkontas kontraŭstaron. Eĉ movadoj por malplimultaj lingvoj en Eŭropo — kun longa historio de lingva memdefendo — ne reagas kontraŭ la kreskanta minaco de la angla. La kataluna, frisa aŭ bretona movado sentas sin minacata de la lingvo de sia ŝtatnacio. La kimra movado, kaj specife Cymdeithas Yr Iaith (<http://www.cymdeithas.com>), konfrontita ekde jarcentoj al la angla minaco, ne agadas strategie je eŭropa aŭ monda nivelo. Tiu manko de strategio kaj konkreta agado evidentiĝas ankaŭ ĉe nacilingvaj asocioj, kiuj plej ofte kontraŭstaras nur la kulturajn misefikojn de angliĝo. Unuigo Germana Lingvo (antaŭe: Unuigo por la Defendo de la Germana Lingvo; <http://www.vwds.de>), kun pli ol 10 000 membroj, ekzemple, agadas kontraŭ la kreskanta uzado de anglaj vortoj en la germana. Ĝi nur malofte agadis kontraŭ specifaj kazoj de devigita uzado de la angla en germanaj firmaoj. Francaj asocioj havas pli longan tradicion defendadi la francan, sen historia ligiteco al tendencoj ekstremmaldekstraj: “Defendo de la franca lingvo”, “Franca imperativo” (<http://www.synapse.net/~imperatif/>), “La rajto kompreni” ([\[francenet.fr/~languefr/ddc\]\(http://francenet.fr/~languefr/ddc\)\). Pro tio la organizaĵo, kun la helpo de gravaj francaj politikistoj, “defendas la francan tut-monde”. Tamen tiu batalo pli kaj pli sajnas senespera. Ĉefino de la kultura instituto Alliance Française en Bruselo diris: “Pro la povo de la angla lingvo, diskonigi la francan kulturon estas senenca laboro”.](http://persoweb.</p>
</div>
<div data-bbox=)

Forum

Esperanto malĉeestas

Ekde jarcento Esperanto proponas solvon al la lingva problemo. Internaciaj e-istaj organizaĵoj estas naturaj partneroj de nacilingvaj asocioj. Bedaŭrinde la Esperanto-movado malĉeestas en gravaj amaskomunikilaj kaj politikaj centroj kiel Bruselo, kie la lingva problemo iĝas tiom akuta. Pro tio, kaj pro la manko de daŭra gazetara kampanjo pri praktikaj efikoj de lingva malegaleco, Esperanto ĝis nun ne atingas ĝuste tiujn eblajn partnerojn. Kaj ĝis tiaj defendantoj de naciaj lingvoj adoptos internacian strategion, gejunuloj tutmonde plu devos bone lerni la anglan por trovi laboron.

Dafydd ap Fergus - Britio/Belgio
Dafyddapfergus@yahoo.com

DAFYDD AP FERGUS (1968), kimro, redaktoro de la Brusela revuo Trends International, lernis E-on en 1999 “pro kultura kaj lingva intereso”. Li estras dissendoliston pri la eŭropa agado de e-istoj (<http://www.egroups.com/groups/europs>).

Ĉu Esperanto helpas gardi malfortajn lingvojn?

Larĝskala apliko de Esperanto en internaciaj kontaktoj helpus konservi la lingvan “ĉielarkon” — jen populara argumento inter la adeptoj de Esperanto. Sed ĉu tio estas logika kaj verŝajna?

Internaciigas kaj la sciencoj kaj la ekonomio. La norvega



komerca altlernejo Norges Handelshøyskole volas fari siajn kursojn grandparte anglalingve, por prepari siajn studentojn al la postuloj de Komercujo. Kompanioj kun filioj en pluraj landoj strebas uzi ununuran lingvon en sia interna komunikado, por ŝpari kostojn. En la scienca mondo oni atingas siajn kolegojn anglalingve. Ne havas sencon ion publikigi en la norvega, se nur kvin norvegoj okupiĝas pri la sama temo! Malnova konato mia, fizikisto, konstatis: “Mi nenion fakan skribis en la norvega post 1994”. Tiu ĉi evoluo estas tute “natura” kaj riskas forigi la norvegan kiel scienca lingvon en multaj fakaroj.

E-o ne ŝirmus la malfortajn

Esperanto povus ludi la saman scienca rolon, same faciligi internacian komunikadon en la komerca kampo, sed neniel malpliigus la flankenigon de malfortaj lingvoj (t.e., ĉi-kuntekste, de preskaŭ ĉiuj). Inverse, pro sia relativa lernfacileco, E-o malaltigus la komencan “koston” de lingvolernado, tiel ke pli multaj funkcioj povus esti plenumataj en la komuna lingvo.

Kiam ĉefo de norvega radio volas nur anglalingvajn

muzikaĵojn en sia kanalo, ne plu temas pri tiaj komunikaj praktikaĵoj. Gravas la angla kiel identigilo, kiu por la celgrupo (gejunuloj) estas ligita al pozitivaj kiel internacieco, moderneco, sukceso, riĉeco kaj mod-sekvemo.

Norvegoj inklinas taksu tro la rektan lingvan efikon de la disvastigo de usondevena amaskulturo. Tamen, en preskaŭ ĉiuj aliaj landoj oni dublas ĉiujn filmojn kaj televidajn intervjuojn, tiel ke juna adoranto de Holivudaj stelrolantoj neniam aŭdas siajn heroojn diri eĉ unu vorton en la angla. La kredo ke “ĉio valora venas de Usono” tamen nerekte prestiĝigas la anglan, kaj gebuboj mem spertas en Interreto ke eĉ malbona lingvoscio malfermas multajn pordojn.

Dialogo ne estas konkuro

Esperanto-movadoj ofte priskribas komunikajn situaciojn en kiuj la flanko kun malpli forta lingvoscio estas ege ĝenata. Tio parte estas prava (kion mi ĉiutage spertas kiel studento en fremda lando), sed oni ne pretervidu ke plej ofte la komunikantoj havas reciprokajn interesojn starigi bonan dialogon. Dialogo ne estas konkuro, la fluparolanto devas adaptiĝi al la kapablo de sia kunparolanto. Alia ofta argumenta malsano estas blindeco por aliaj distingiloj ol la naciaj aŭ lingvaj. En sia mondperecepto 14-jara knabo el Oslo verŝajne multe pli similas al sia samaĝulo el Parizo ol al siaj geavoj en najbara urbeto. Tiun faktoron pretervidas la konservema etnocentra analizo e-ista.

Ĉu do Esperanto, pro la alternativaj identigaj valoroj ligitaj al ĝi, malpli endanĝerigus aliajn lingvojn? Se la sinteno de la nunaj esperantistoj ĝeneraliĝus, la respondo estus nepre jesa. Tamen malfacilas imagi ke tiuj valoroj ne ŝanĝiĝus se la lingvo estus ĝenerale akceptata kiel

internacia komunikilo, eventuale tra stadio kiel Eŭrop-unia lingvo (ege neverŝajne, sed ni ludu kun la penso...). Krei same influan amaskulturon esperantlingvan kiel la nuna usona estus, nu... tre defia laboro. Sen tia kulturo ankaŭ la influo al aliaj lingvoj malpliĝus, simple ĉar la lingvo ne havus saman statuson (Esperantujo ne estus sopirata lando de sap-operoj). Temas pri nuancoj, ankaŭ Esperanto ja devus identiĝi kun socie popularaj valoroj, komerce vendeblaj, por akceptiĝi. Sed valoroj ja povas ŝanĝiĝi...

Mi renkontis en Rusio gepatrojn kiuj komunikis anglalingve kun siaj infanoj, por doni al ili karierajn avantaĝojn. Kompreneble la samo okazus se la anglan oni anstataŭigus per Esperanto! Por niaj pioniroj, en tempo de nacia romantiko, gravis aserti ke Esperanto ne celas anstataŭi la naciajn lingvojn, sed nur helpi la rilatojn inter nacioj. Hodiaŭ tiu distingo ne plu estas klara, kaj same kiel la angla, Esperanto penetras en multajn sferojn kiuj antaŭe estis konsiderataj internaj. En la Okcidento pligraviĝas — kompare al nacia aparteno — identecoj generaciaj, regionaj aŭ sociaj, kaj tio helpas la antaŭeniron de la angla.

(Tamen ne temas pri ĝenerala fenomeno: en granda parto de la mondo ideoj pri nacieco ludas pli gravan rolon ol iam ajn antaŭe.) Ofte malfavorata lingva grupo protestas kontraŭ influo de pli forta nacia lingvo, sed senprobleme akceptas la anglan kiel internacian.

Morta lingvo ne voras?

La itala aŭtoro Andrea Chiti-Batelli asertas ke “morta” lingvo, t.e. lingvo kiu ne estas la unua por iu grupo, kiel ekz. la latina en la mezepoko, ne “voras” aliajn lingvojn. Ĉu kredinda argumentado? Esperanto eble ne same efike penetras en aliajn lingvojn,

sed se ĝi funkcias kiel ĝenerala “prestiĝa” interlingvo, ĝi nepre influas aliajn, sendepende de la “morta” statuso.

Resume, ni vidas ke internaciigo multfacete favoras uzadon de ununura helpa lingvo, kiu tendencas kelkrite forpuŝi aliajn lingvojn el ties antaŭaj funkci-sferoj. Pro sia relativa lernfacileco, E-o tion farus eĉ pli amplekse ol la angla hodiaŭ, kvankam ĉe malpli forta subteno amaskultura (kaj probable politika). Ke tio ŝajne ne okazas, indikas ke lingva prestiĝo estas multfoje pli grava ol lernfacileco.

La paradoksa servo

La Esperanto-movado en la nuna mondo tamen povas, kiel ekzemplo pri alternative organizita internacia komunumo, kune kun aliaj samtendencaj movadoj, atentigi pri la rolo de lingvoj, pri lingvaj rajtoj kaj la valoro de lingva diverseco, kio espereble rezultigus plian atenton al tiuj ĉi problemoj. Gravas kaj tio ke reprezentantoj de UEA levas la demandon pri lingvaj rajtoj en internaciaj forumoj, kaj la fakta ekzisto de la e-ista komunumo kun la valoroj ĝenerale ligitaj al ĝi. Ĉiukaze, por ludi tiun rolon (kaj por igi la vivon de esperantistoj pli interesa) preferindus pli multkapa lingvanaro. Sed paradokse: Esperanto povus fari pli gravan servon por konservado de malfortaj lingvoj antaŭ la fina venko ol post ĝi!

Bård Hekland - Norvegio/Britio
☐bhekland@yahoo.co.uk

BÅRD HEKLAND (1975),
studento pri politika kaj organiza sciencoj,
komitatano de TEJO,
anstataŭanto en la estraro de Norvega E-Ligo.

Tutmondiĝo: Labori angle

En ekonomio la tutmondiĝo atingis novajn rekordojn. Milionoj da dungitoj nun laboras por internaciaj grupoj nove kuniĝintaj. En la venontaj jaroj iliaj laborkondiĉoj funde ŝanĝiĝos. Milionoj da homoj devos rapide lerni la anglan por respondi al la defioj en novaj internaciaj firmaoj kaj por konkurenci en merkato tutmonda.

La unuaj ses monatoj de 2000 estis vere nova jarmilo por la komerca mondo. Laŭ konstato de internacia komerca konsult-firmao, KPMG, kiu studis 3310 internaciajn fuziojn, la totala valoro de kunigitaj firmaoj altiĝis al 643 miliardoj da usonaj dolaroj en tiu periodo. Tio estas 60% pli ol en la antaŭaj ses monatoj. Evidente, la fenomeno multe pli koncernas Eŭropon: je valoro de 352 miliardoj da dolaroj, ĉ. 55% de la tutmonda totalo. En 1999, laŭ valoro 73% de la fuzioj okazis en Eŭropo, plejparte inter eŭropaj firmaoj. "La sekva defio estas unuigi ĉi tiujn grandegajn kombinaĵojn sufiĉe bone por altigi la valoron por akciuloj" — diras David Beaver, prezidanto de KPMG. La konsultfirmao avertas ke pli ol ok el dek fuzioj malsukcesas atingi altigon de valoro. Kultura faktoroj estas unu el la plej grandaj problemoj por la novaj firmaoj, specife en Eŭropo.

Sveda kasisto, franca ĉefo

"Vere tutmonda socio povas esti atingita nur per vera kompreno" — klarigas la prezidanto de Aventis, Jürgen Dormann (prezidinto de Hoechst), kaj Aventis-vicprezidanto Jean-René Fourtou (prezidinto de Rhône-Poulenc). Aventis estis la grupo kuniĝinta el la germana Hoechst kaj la franca Rhône-Poulenc. En 1998 Hoechst-firmaoj

dungis preskaŭ 100 000 homojn tutmonde, plejparte en Germanio. En 1999 Rhône-Poulenc havis 65 180 dungitojn: 44% en Francio, 18% en aliaj eŭropaj landoj, 18% en Kanado kaj Usono, 7% en Brazilo. En internacia grupo komuna lingvo estas esenca por bona kontrolado kaj funkciado. Sveda kasisto, ekzemple, devas kompreni la notojn de franca ĉefo. Pro tio internaj dokumentoj devas esti en komuna lingvo.

Dormann kaj Fourtou diras: "Por evoluigi nian grupan kulturon ĉe Aventis, lingvo estas esenca. Ni dependas de la angla kiel internacia komerca lingvo por funkciigi niajn tutmondajn procesojn kaj projektojn" (vidu <http://www2.aventis.com/forum/fut0002/fut0002.htm>). Multaj el la pli ol 150 000 dungitoj rapide devas lerni la anglan. La internacia lingvo estas eĉ pli grava por la ĉefoj kaj subĉefoj vokitaj labori eksterlande. En 1998 pli ol 500 ĉefoj diversnaciaj havis eksterlandan postenon ĉe Rhône-Poulenc. En la novaj firmaoj multe pli da dungitoj devos akcepti postenon eksterlande. Pro tio estas esence ke la manaĝeroj bone regu la anglan. Ankaŭ por la miloj da Aventis-esploristoj la angla, kiel internacia lingvo de scienco, fariĝis grava por iliaj karieroj.

Germanoj angle al germanoj

Ĉe Siemens, kun 443 000 dungitoj en 190 landoj, la angla iĝis fundamenta parto de la korporacia kulturo. "Ni parolu kaj skribu la anglan. Pli ol 60% de niaj dungitoj laboras en aliaj landoj. Ofte alilingvanoj devas legi niajn raportojn" — diras germana ĉefo kiu laboras en Belgio. "Tamen estas tute ridinde ke ni germanoj devu skribi angle al germanaj kolegoj en Germanio. Estas tiom stulte fari tion kiam nur germanoj legos la raportojn. Tia estas la lingva politiko de la

firmao." Grava por Siemens en la elektado de novaj dungitoj, krom bona faka kono, estas bona regado de la internacia lingvo. "Bona angla estas la bazo por antaŭenigi en tutmonda ekonomio" — klarigas la TTT-ejo de Siemens.

DaimlerChrysler havas 466 938 dungitojn tutmonde, el kiuj 101 777 en Germanio. Laŭ dokumentoj de la firmao, kies oficiala lingvo estas la angla, tiuj kiuj ne sukcesas regi la anglan, ne havu malpliajn ŝancojn de kariero. "Tamen en la estonteco, kaj specife por manaĝeroj, kono de la angla estos pli grava kriterio por la elektado de laborlokoj."

Minoritatoj senreagaj

Ekonomia angliĝo ne renkontas kontraŭstaron. Eĉ movadoj por malplimultaj lingvoj en Eŭropo — kun longa historio de lingva memdefendo — ne reagas kontraŭ la kreskanta minaco de la angla. La kataluna, frisa aŭ bretona movado sentas sin minacata de la lingvo de sia ŝtatnacio. La kimra movado, kaj specife Cymdeithas Yr Iaith (<http://www.cymdeithas.com>), konfrontita ekde jarcentoj al la angla minaco, ne agadas strategie je eŭropa aŭ monda nivelo. Tiu manko de strategio kaj konkreta agado evidentiĝas ankaŭ ĉe nacilingvaj asocioj, kiuj plej ofte kontraŭstaras nur la kulturajn misfikojn de angliĝo. Unuigo Germana Lingvo (antaŭe: Unuigo por la Defendo de la Germana Lingvo; <http://www.vwds.de>), kun pli ol 10 000 membroj, ekzemple, agadas kontraŭ la kreskanta uzado de anglaj vortoj en la germana. Ĝi nur malofte agadis kontraŭ specifaj kazoj de devigita uzado de la angla en germanaj firmaoj. Francaj asocioj havas pli longan tradicion defendadi la francan, sen historia ligiteco al tendencoj ekstremmaldekstraj: "Defendo de la franca lingvo", "Franca imperativo" (<http://www.synapse.net/~imperatif/>), "La rajto kompreni" ([\[francenet.fr/~languefr/ddc\]\(http://francenet.fr/~languefr/ddc\)\). Pro tio la organizaĵo, kun la helpo de gravaj francaj politikistoj, "defendas la francan tutmonde". Tamen tiu batalo pli kaj pli ŝajnas senespera. Ĉefino de la kultura instituto Alliance Française en Bruselo diris: "Pro la povo de la angla lingvo, diskonigi la francan kulturon estas sensenca laboro".](http://persoweb.</p>
</div>
<div data-bbox=)



Esperanto malĉeestas

Ekde jarcento Esperanto proponas solvon al la lingva problemo. Internaciaj e-istaj organizaĵoj estas naturaj partneroj de nacilingvaj asocioj. Bedaŭrinde la Esperanto-movado malĉeestas en gravaj amaskomunikilaj kaj politikaj centroj kiel Bruselo, kie la lingva problemo iĝas tiom akuta. Pro tio, kaj pro la manko de daŭra gazetara kampanjo pri praktikaj efikoj de lingva malegaleco, Esperanto ĝis nun ne atingas ĝuste tiujn eblajn partnerojn. Kaj ĝis tiaj defendantoj de naciaj lingvoj adoptos internacian strategion, gejunuloj tutmonde plu devos bone lerni la anglan por trovi laboron.


Dafydd ap Fergus - Britio/Belgio
Qdafyddapfergus@yahoo.com

DAFYDD AP FERGUS (1968), kimro, redaktoro de la Brusela revuo Trends International, lernis E-on en 1999 "pro kultura kaj lingva intereso". Li estras dissendoliston pri la eŭropa agado de e-istoj (<http://www.egroups.com/groups/europo>).

Ĉu Esperanto helpas gardi malfortajn lingvojn?

Larĝskala apliko de Esperanto en internaciaj kontaktoj helpus konservi la lingvan "ĉielarkon" — jen populara argumento inter la adeptoj de Esperanto. Sed ĉu tio estas logika kaj verŝajna?

Internaciigas kaj la sciencoj kaj la ekonomio. La norvega



komerca altlernejo Norges Handelshøgskole volas fari siajn kursojn grandparte anglalingve, por prepari siajn studentojn al la postuloj de Komerco. Kompanioj kun filioj en pluraj landoj strebas uzi ununuran lingvon en sia interna komunikado, por ŝpari kostojn. En la scienca mondo oni atingas siajn kolegojn anglalingve. Ne havas sencon ion publikigi en la norvega, se nur kvin norvegoj okupiĝas pri la sama temo! Malnova konato mia, fizikisto, konstatis: "Mi nenion fakan skribis en la norvega post 1994". Tiu ĉi evoluo estas tute "natura" kaj riskas forigi la norvegan kiel sciencon lingvon en multaj fakaroj.

E-o ne ŝirmus la malfortajn

Esperanto povus ludi la saman sciencon rolon, same faciligi internacian komunikadon en la komerca kampo, sed neniel malpliigus la flankenigon de malfortaj lingvoj (t.e., ĉi-kuntekste, de preskaŭ ĉiuj). Inverse, pro sia relativa lernfacileco, E-o malaltigus la komencan "koston" de lingvolernado, tiel ke pli multaj funkcioj povus esti plenumataj en la komuna lingvo.

Kiam ĉefo de norvega radio volas nur anglalingvajn

muzikaĵojn en sia kanalo, ne plu temas pri tiaj komunikaj praktikaĵoj. Gravus la angla kiel identigilo, kiu por la celgrupo (gejunuloj) estas ligita al pozitivaj kiel internacieco, moderneco, sukceso, riĉeco kaj mod-sekveco.

Norvegoj inklinas taksu troa la rektan lingvan efikon de la disvastigo de usondevena amaskulturo. Tamen, en preskaŭ ĉiuj aliaj landoj oni dubas ĉiujn filmojn kaj televidajn intervjuojn, tiel ke juna adoranto de Holivudaj stelrolantoj neniam aŭdas siajn heroojn diri eĉ unu vorton en la angla. La kredo ke "ĉio valora venas de Usono" tamen nerekte prestiĝigas la anglan, kaj gebuboj mem spertas en Interreto ke eĉ malbona lingvoscio malfermas multajn pordojn.

Dialogo ne estas konkuro

Esperanto-movadoj ofte priskribas komunikajn situaciojn en kiuj la flanko kun malpli forta lingvoscio estas ege ĝenata. Tio parte estas prava (kion mi ĉiutage spertas kiel studento en fremda lando), sed oni ne pretervidu ke plej ofte la komunikantoj havas reciprokajn interesojn starigi bonan dialogon. Dialogo ne estas konkuro, la fluparolanto devas adaptiĝi al la kapablo de sia kunparolanto. Alia ofta argumenta malsano estas blindeco por aliaj distingiloj ol la naciaj aŭ lingvaj. En sia mondpercepto 14-jara knabo el Oslo verŝajne multe pli similas al sia samaĝulo el Parizo ol al siaj geavoj en najbara urbeto. Tiun faktoron pretervidas la konservema etnocentra analizo e-ista.

Ĉu do Esperanto, pro la alternativaj identigaj valoroj ligitaj al ĝi, malpli endanĝerigus aliajn lingvojn? Se la sinteno de la nunaj esperantistoj ĝeneraliĝus, la respondado estus nepre jesa. Tamen malfacilas imagi ke tiuj valoroj ne ŝanĝiĝus se la lingvo estus ĝenerale akceptata kiel

internacia komunikilo, eventuale tra stadio kiel Eŭrop-unia lingvo (ege neverŝajne, sed ni ludu kun la penso...). Krei same influan amaskulturon esperantlingvan kiel la nuna usona estus, nu... tre defia laboro. Sen tia kulturo ankaŭ la influo al aliaj lingvoj malpliigus, simple ĉar la lingvo ne havus saman statuson (Esperantujo ne estus sopirata lando de sap-operoj). Temas pri nuancoj, ankaŭ Esperanto ja devus identiĝi kun socie popularaj valoroj, komerce vendeblaj, por akceptiĝi. Sed valoroj ja povas ŝanĝiĝi...

Mi renkontis en Rusio gepatrojn kiuj komunikis anglalingve kun siaj infanoj, por doni al ili karierajn avantaĝojn. Kompreneble la samo okazus se la anglan oni anstataŭigus per Esperanto! Por niaj pioniroj, en tempo de nacia romantiko, gravis aserti ke Esperanto ne celas anstataŭi la naciajn lingvojn, sed nur helpi la rilatojn inter nacioj. Hodiaŭ tiu distingo ne plu estas klara, kaj same kiel la angla, Esperanto penetras en multajn sferojn kiuj antaŭe estis konsiderataj internaj. En la Okcidento pligraviĝas — kompare al nacia aparteno — identecoj generaciaj, regionaj aŭ sociaj, kaj tio helpas la antaŭeniron de la angla. (Tamen ne temas pri ĝenerala fenomeno: en granda parto de la mondo ideoj pri nacieco ludas pli gravan rolon ol iam ajn antaŭe.) Ofte malfavorata lingva grupo protestas kontraŭ influo de pli forta nacia lingvo, sed senprobleme akceptas la anglan kiel internacian.

Morta lingvo ne voras?

La itala aŭtoro Andrea Chiti-Batelli asertas ke "morta" lingvo, t.e. lingvo kiu ne estas la unua por iu grupo, kiel ekz. la latina en la mezepoko, ne "voras" aliajn lingvojn. Ĉu kredinda argumentado? Esperanto eble ne same efike penetras en aliajn lingvojn,

sed se ĝi funkcias kiel ĝenerala "prestiĝa" interlingvo, ĝi nepre influas aliajn, sendepende de la "morta" statuso.

Resume, ni vidas ke internaciigo multfacete favoras uzadon de ununura helpa lingvo, kiu tendencas kelkrite forpuŝi aliajn lingvojn el ties antaŭaj funkcisferoj. Pro sia relativa lernfacileco, E-o tion farus eĉ pli amplekse ol la angla hodiaŭ, kvankam ĉe malpli forta subteno amaskultura (kaj probable politika). Ke tio ŝajne ne okazas, indikas ke lingva prestiĝo estas multfoje pli grava ol lernfacileco.

La paradoksa servo

La Esperanto-movado en la nuna mondo tamen povas, kiel ekzemplo pri alternative organizita internacia komunumo, kune kun aliaj samtendencaj movadoj, atentigi pri la rolo de lingvoj, pri lingvaj rajtoj kaj la valoro de lingva diverseco, kio espereble rezultigus plian atenton al tiuj ĉi problemoj. Gravus kaj tio ke reprezentantoj de UEA levas la demandon pri lingvaj rajtoj en internaciaj forumoj, kaj la fakta ekzisto de la e-ista komunumo kun la valoroj ĝenerale ligitaj al ĝi. Ĉiukaze, por ludi tiun rolon (kaj por igi la vivon de esperantistoj pli interesa) preferindus pli multkapa lingvanaro. Sed paradokse: Esperanto povus fari pli gravan servon por konservado de malfortaj lingvoj antaŭ la fina venko ol post ĝi!

Bård Hekland - Norvegio/Britio
☐bhekland@yahoo.co.uk

BÅRD HEKLAND (1975),
studento pri politika kaj organiza sciencoj,
komitatano de TEJO,
anstataŭanto en la estraro de Norvega E-Ligo.

Kalendaro 2000-2001

Kvankam ni laŭeble kontrolis la divers-fontajn informojn pri la menciitaj aranĝoj, ni ne povas garantii la fideindecon de ĉiu ero en ĉi tiu kalendaro. Informoj jam aperintaj en julio (p. 130-131) ne nepre estas ripetataj. La sekva kalendaro aperos en la marta numero.

novembro

- 04-05: **12-a Nordfranca Eŭropa Rendevuo**, Morbecque, Francio (Jean Dietrich, 104 rue J. Jaurès, FR-59192 Beuvrages; ☎+33/3/27-33-79-31)


Morbecque
Francio
04-05 nov. 2000

**12a Nordfranca
Eŭropa
Esperanto-Rendevuo**

- 04-05: **11-a Kongreso de Ukrainia E-Asocio**, Kievo, Ukrainio (Volodimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kiev 133; ☎+38/044/295-17-01; ✉ukrea@esperanto.nu)
- 08-10: **Terminologia seminario** (temo: "[Ne nur] fervoja transporto kaj trafiko") antaŭ KAEST
- 10-12: **KAEST 2000**, Kolokvo "Aplikoj de E-o en scienco kaj tekniko", Prago, Ĉeĥio (KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobruška, ☎+420/2/991-22-01; ✉991-21-26; ✉kaest@kava-pech.cz, http://kava-pech.cz/kaest; temo: "Ekonomio sojle al la tria jarmilo", sub aŭspicioj de UEA)
- 10-12: **Glivice-a rendevuo de uzantoj kaj praktikantoj de E-o**, Gliwice, Pollando (Stanisław Mandrak, ul. Kormoranów 39/16, PL-44-114 Gliwice; ☎+48/32/232-60-35; ✉staman@ka.onet.pl)
- 11-13: **6-a Kolombia Kongreso de E-o**, Armenio, Kolombio (Kolombia E-Ligo, Calle 7A # 56-76, Casa 12, Cali, Valle; ☎+57/2/223-86-18; ✉223-84-33; ✉rdtorres@gratis1.com.co)
- 19: **13-a E-Renkontiĝo de Okcidenta Regiono**, Rio de Janeiro, Brazilo (EKOR, Str. Cel. Agostinho 126, Fundos, Campo Grande, BR-23050-360 Rio de Janeiro)
- 24-26: **Studosemajnfino**, Vlaardingen, Nederlando (Jeannette Bosse-Sibbel, P. Dondersstr. 23, 5613 LP Eindhoven, ☎+31/40/211-33-44)
- 25: **Malferma Tago**, CO de UEA (vd. anoncon sur p. 199; gasto: Spomenka Štimatec)
- 25: **2-a Esperanta Filmfestivalo**, Bratislava, Slovakio (Pavol Kaščák, Vážska 21, SK-82107 Bratislava; ✉esperanto@nextra.sk, http://www.home.sk/www/esperanto/informoj.htm)

decembro

- 01-03: **Sankta-Nikola festo**, Murzasichle, Slovakio (Esperanto – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, Poprad, Slovakio; ☎/✉+421/92/32-419; ✉milanzvara@hotmail.com)
- 01-03: **Jarfina kaj Zamenhofa Festo**, Lepsiko, Germanio (Werner Geidel, Karlsruher Str. 5, DE-04209 Leipzig; ☎+49/341/411-85-77)
- 02-03: **Semajnfina studseminario**, Herzberg/Harz, Germanio (E-Asocio Südharz, Grubenhangenstr. 8, DE-37412 Herzberg/Harz; ☎/✉+49/55/211-363)



44-A INTERNACIA SEMINARIO
Cuxhaven, Germanio, 27 dec.-03 jan

- 03-05: **Antaŭkristnaska Renkontiĝo**, Bratislava, Slovakio (Alica Komlóšiová – ESO, Rovníkova 6, SK-821 02 Bratislava; ☎+421/7/43-29-16-04)
- 08-10: **Faulhaber-semajnfino**, Elspeet, Nederlando (Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard; ✉ten.hagen.esperanto@vxs.nl; temo: "Revoj kaj idealoj en la 21-a jc.")
- 08-10: **Seminario pri instruado de E-o en Italio**, Frascati, Italio (✉f.esp.it@infinito.it)
- 08-10: **54-a Kultura Semajnfino** de Sarlanda E-Ligo, Homburg/Saar, Germanio (SEL, Pf. 1844, DE-66468 Zweibrücken; ☎+49/6332/981-190; ✉981-192; ✉sel@mohrbach.de)
- 09: **17-a Ĉeĥa-Saksa Tago**, Ústí n. Labem, Ĉeĥio (Miroslav Smyčka, Kojetická str. 90, CZ-400 03 Ústí n. Labem, ☎+420/47/553-24-17)
- 10-15: **Zamenhofa Semajno: Iom pli pri la unuaj E-revuoj**, Kvinpetalo, Francio (Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse; ☎/✉+33/5/49-42-80-74; ✉kvinpetalo@post.club-internet.fr, http://hometown.aol.com/yannickdum/kvinpetalo.html; gvidas Thérèse Pinet kaj Georges Lagrange)

- 15-17: **AEROB + Tago de E-libro**, Bratislava, Slovakio (Komlóšiová, vidu 03-05 dec.)
- 15-17: **Tutlanda Zamenhof-Festo**, Niš, Jugoslavio (Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, YU-18000 Niš; ☎+381/18/322-609; ✉zcciric@eunet.yu)
- 27-31: **8-a Togolanda E-Kongreso**, kun UEA/ILEI-ekzamenoj, Tsevié, Togolando (UTE, B. P. 12096, Lomé; ✉esp.togo@cafe.tg)
- 27 dec.-03 jan.: **17-a Internacia Festivalo**, Trier, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ☎/✉+49/5624/8007; ✉HDP@internacia-festivalo.de, http://www.internacia-festivalo.de; temo: "E-o kaj infanoj")
- 27 dec.-03 jan.: **44-a Internacia Seminario**, Cuxhaven, Germanio (Norbert Piechotta, Rondellstr. 3, DE-85540 Haar; ☎/✉+49/89/688-37-79, ✉is.admin@esperanto.dex, http://www.esperanto.de/is/; temo: "Survoje al la nova jarmilo – kio estas antaŭ ni?")
- 30 dec.-02 jan.: **Silvestra balo kaj vintraj ekskursoj**, Poprad, Slovakio (vidu 01-03 dec.)
- 30 dec.-02 jan.: **Novjara renkontiĝo**, Ĉeboksari, Ĉuvaŝa Resp., Ruslando (✉asocio@chuvsu.ru)

2001

januaro

- 05-07: **Kongreso de Novzelanda E-Asocio**, Aŭklando, Novzelando (NZE, P. O. B. 8140 Symonds Street, Auckland 1035, ☎+64/9/579-47-67)
- 13-21: **17-a Aŭstralia Somerkursaro**, Melbourne, Aŭstralio (Jennifer R. Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Vic. 3122; ☎+61/3/98-18-73-58; ✉episkopo@hotmail.com)
- 20-27: **42-a Internacia Fervojista E-Skisemajno**, Tatranská Lomnica, Slovakio (Magdaléna Feičíková, A. Bernoláka 25/5, SK-010 01 Žilina; ✉feicikova@vud.sk)

februaro

- 17-18: **Semajnfina studseminario**, Herzberg/Harz, Germanio (vidu 02-03 dec.)
- 17-24: **3-a Aranĝo Junularo-Nordio**, Trondheim, Norvegio (Espen Nystad, Herman Kraggs v. 31-43, NO-7050 Trondheim; ✉ajn@esperanto.no)
- 18-24: **Semajno de Internacia Amikeco**

Interreto. Monate aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj konsulteblas ĉe la TTT-paĝoj www.esperanto.hu/kalendar.htm. Por ricevi txt-version de la plena kalendaro, sendu retmesaĝon (enhavo ne gravas) al la aŭtomato kalendario@esperanto.org. En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en *Evento*.

marto

- 04-11: **Rusia E-Kongreso** kaj **13-a EoLa** ("E-o - lingvo arta"), Sankt-Peterburgo, Ruslando (Ksenija Kojevnikova, p/k 28, RU-195274 Sankt-Peterburgo; ☎+7/812/591-48-88; ✉naskoj@mail.ru)
- 25 marto-01 apr.: **TEJO-seminario**, Budapeŝto, Hungario (Katerina Evlampieva, str. Huzangaja, 29-157, RU-428027 Ĉeboksari, Ruslando; ☎+7/8352/576-685; ✉kat-jevl@cbx.ru; temo: "La lingva ĉielarko - ponto al kulturaj trezoroj")
- 30 marto - 04 apr.: **Jarkongreso de Franca Fervojista E-Asocio**, Thionville (AFCE, Espéranto, 1 bis rue d'Athènes, FR-75009 Paris; ✉Jean.Ripoche@wanadoo.fr)

aprilo

- 09-16: **17-a Printempa Semajno Internacia**, St. Andreasberg, montaro Harco, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ✉2641/978-666; ✉psi@esperanto.de, <http://www.esperanto.de/psi>; temo: "Eŭropo sen lingvaj limoj?")
- 15-17: **56-a Kongreso de SAT-Amikaro**, Chambéry, Francio ("Esperanto Vive", Maison des Associations, FR-73000 Chambéry, ☎+33/4/79-33-95-50; ✉79-33-95-88; ✉esperviv@hotmail.com)
- 15-21: **5-a Tutamerika Kongreso**, Meksikurbo (Meksika E-Federacio, Apdo. 10576, México 06000, D. F.; ✉mef@punto-y- aparte.com, <http://www.geocities.com/espameriko/amtake.htm>; temo: "Ameriko, unu kontinento, diversaj historioj")

5^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

Meksikurbo, 15-21 apr. 2001

- 20-22: **49-a Praktika Staĝo de Parolata E-o**, Storkensohn, Francio (Robert Kueny, 30 rue des Champs, FR-68690 Geishouse; ☎+33/3/89-82-37-62; ✉mulhouse.esperanto@mageos.com)
- 28 apr.-06 majo: **26-aj E-Tagoj de Bydgoszcz** kaj **19-a Pola Studadesio de AIS**, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz; ☎+48/52/341-57-44; ✉andreo@rubikon.net.pl)

majo

- 04-07: **96-a Skota Kongreso de E-o**, Motherwell, Skotlando, Britio (E-Asocio de Skotlando, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP; ✉secretary@ScottishEsperanto.Gothere.uk.com)

- 12-19: **53-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio**, Tábor, Ĉeĥio (KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, ✉ifej-kongreso@kava-pech.cz, <http://www.kava-pech.cz/IFEJ-kongreso/index.htm>)

junio

- 01-04: **Germana E-Kongreso**, Ludwigshafen (Germana E-Asocio, Immentalstr. 3, DE-79104 Freiburg; ☎+49/761/289-299; ✉289-296; ✉gea.esperanto@esperanto.de)
- 02-04: **Franca E-Kongreso**, Limoges (Unuiĝo Franca por E-o, 4 bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; ☎+33/1/42-78-68-86; ✉42-78-08-47; ✉omoreau@esperanto.org; temo: "2001, eŭropa jaro de la lingvoj")



86-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Zagreb, 21-28 jul. 2001

- 11-17: **17-a Internacia Simpozio pri E-Turismo**, Huizingen, Belgio (Monda Turismo, vidu 28 apr.)

julio

- 11-18: **Staĝo por aktoroj kaj teatremuloj**, Kvintepeto, Francio (vidu 10-15 dec. 2000)
- 14-19: **11-a Internacia E-Kongreso**, Chestel-Valencio, Hispanio (Monda Turismo, vidu 28 apr.)
- 14-20: **74-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda**, Nagykanizsa, Hungario (Tibor Szabadi, Pf. 66, HU-8800 Nagykanizsa; ✉esp.sz.tibor@sienet.hu, <http://www.multimania.com/satesperanto>)
- 14-20: **Internacia E-Konferenco** de OSIEK, Strážnice, Ĉeĥio (Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice; ☎+420/631/332-278; ✉332-507; ✉vlada_hasala@iol.cz; temo: "Karolo Piĉ kaj liaj mondoj")
- 14-21: **15-a Ekumena E-Kongreso (54-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista kaj 51-a Kongreso de Kristana E-ista Ligo Internacia)** kaj **5-a Junulara Ekumena E-Tendaro**, Zagreb, Kroatio (Marija Belošević, Sveti duh 87, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/374-50-52; ✉marja.belosavic@public.srce.hr; por IKUE: Via di Porta Fabbri- ca 15, IT-00165 Roma, Italio; ☎+39/6/632-839; ✉ikue@ikue.org; por KELI: Els van Dijk, Koningsmantel 4, NL-2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando, ✉javadi@worldonline.nl)

- 14-21: **67-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj**, Zagreb, Kroatio (Antun Kovač, Matice Hrvatske 42, HR-10415 Velika Gorica; ☎+385/1/610-65-83)

- 19-21: **Eŭropa konferenco "Kiel certigi lingvan kaj identecan egalrajtecon en EU?"**, Tainach/Tinje ĉe Klagenfurt, Aŭstrio (Asocio por Eŭropa Konscio, p/a Zlatko Tišljar, Besednjakova 1, SI-2000 Maribor, Slovenio; ☎+386/2/420-06-69)

- 21-28: **34-a Internacia Infana Kongreseto** por E-parolantaj infanoj inter 6 kaj 14 jaroj, Zagreb, Kroatio (Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ✉stefan.maccgill@galamb.net)

- 21-28: **86-a Universala Kongreso de E-o**, Zagreb, Kroatio (CO de UEA, adreso en la kolofono, <http://pubwww.srce.hr/esperanto-uk/zagreb.htm>; temo: "Kulturo de dialogo - dialogo inter kulturoj")

- 28-30: **Internacia simpozio pri lingva planado kaj leksikologio**, organizata de Akademio de E-o kaj de Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, Zagreb, Kroatio (Spomenka Štimatec, Nova Ves 87, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/461-93-73; ✉esperanto@zg.tel.hr)

- 28 jul.-01 aŭg.: **70-a Itala Kongreso de E-o**, Triesto, Italio (Triesta E-Asocio, CP 601, IT-34100 Trieste; ✉nored@tiscalinet.it, <http://members.xoom.it/verdestelo>)

- 28 jul.-04 aŭg.: **35-a ILEI-Konferenco**, Savudrija, Kroatio (Orbis Pictus, Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, Italio; ☎+39/40/767-875; ✉orbispictus@iol.it, <http://users.iol.it/orbispictus>)

- 28 jul.-04 aŭg.: **Renkontiĝo de E-familioj**, Savudrija, Kroatio (Ankica Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/363-14-38; ✉ankica.jagnjic@zg.tel.hr)

- 29 jul.-05 aŭg.: **57-a Internacia Junulara Kongreso**, Strasburgo, Francio (Junulara E-ista Franca Organizo, IJK 2001 - LKK, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris, <http://purl.org/net/ijk2001>; temo: "Plurlingvismo en Eŭropo: kiel ĝin sukcesigi")


2002

- 20-26 julio: **Internacia E-Konferenco** de OSIEK, Lovenjo, Belgio ("Esperanto 3000", Rue R. Ménada 44, BE-1320 Hamme-Mille; ✉esperanto3000@esperanto.be; temo: "Scienco kaj socio")

- 03-10 aŭg.: **87-a Universala Kongreso de E-o**, Fortaleza, Brazilo (CO de UEA, adreso en la kolofono)

2003

- 26 jul.-2 aŭg.: **88-a Universala Kongreso de E-o**, Gotenburgo, Svedio



Recenzoj

Beletra

Kapturna ĝuo


Kapturnoj. Higinio García (1939).
Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999.
159p. 21cm. € 16,50.

Ĉu homeco povos transvivi en futura socio? Ĉu en la nuna? Kiuj trajtoj de nia ĉiutaga vivo povos konduki al terura kaj nevivinda estonteco, kaj kiuj eble restos kiel ĝermoj de io valora?

Jen demandoj kiujn oni povas fari al si legante la originalan novelaron *Kapturnoj* de Higinio García.

En dek unu noveloj komunkadraj oni ekkonas kaj spertas la ontan vivon en

Uzinurbo, socio kie regas tre aparta mikso de ciniko kaj naivo, kredo je la Libera Merkato kaj je astrologio, kruela klasa socio, libereco de iuj kaj despotismo super aliaj, superstiĉo kaj racismo ĝis absurdo. Depende de propraj spertoj kaj juĝoj, la leganto povas rekonigi aŭ ne rekonigi en ĝi nian propran epokon. Temas do pri scienc-fikciaĵo aŭ "malutopio" – sed tio timigu neniun leganton. Ĉi tie forestas temposaltoj kaj spacmilito, kaj eĉ laseraĵ glavo ludas rolon



nur akcesoran. Gravas ĉi tie la homaj interrilatoj.

Ĉiu el la noveloj havas sian tute propran ĉeftemon kaj tonon, tamen restas ero de tutaĵo. García mastras plurajn etosojn, kaj oni avide eklegas ĉiun novan rakonton. Jen kaj jen sentiĝas parenceto al verkoj el la mondliteraturo. Du tri noveloj, ekz. *Nekomputita*, estas angorige nigraj, pensigantaj ekz. pri "Mekanika orango" de Burgess. La longa

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2001

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 52-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 86-a Universala Kongreso en Zagrebo.

Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al UK-ĉeesto. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.
Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.
Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK, "Kulturo de dialogo – Dialogo inter kulturoj". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "Ahn Song-san" kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. ĉe Eseo). Daŭro inter 15 kaj 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2000. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2001. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2001. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La veraj nomoj kaj adresoj estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 190 eŭroj; dua premio: 133 eŭroj; tria premio: 76 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 133 eŭroj; Infanlibro de la Jaro: 399 eŭroj.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo troviĝas ĉe <http://uea.org>, ĉe "Regularoj", kaj haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe la CO de UEA (vidu kolofonon), ankaŭ retroŝte (✉ uea@inter.nl.net).

titola novelo *Kapturnoj* ŝajnas moderna, tre fantazio-riĉa *Alico en Mirlando* de Carroll, kie la "Nov-Aĝa" kredaro formas ridigan kaj vere kapturman spegulon de nia epoko. En aliaj, kiel *Paĉjo*, oni povus ekpensi pri "Galaksia Gvidlibro por Petveturantoj" de Adams. Sed ĉion García modlas laŭ sia propra maniero kaj temperamento. Laŭ skalo ekde bonvola humuro ĝis makabra karikaturo, li satiras pri ecoj de la hodiaŭo, kiel nia monavido kaj konsumemo, nia kredo je spiritoj kaj je senspiriteco, nia manko de historia konscio ktp. Rolas fojfoje ankaŭ bestoj, robotiganta homo kaj eble homiĝanta roboto.

Aliaj noveloj satiras pri socia malgaleco, instruado kaj scienco, eŭtanazio, spiritismo kaj eĉ – ajlo! En la majstra fina novelo García en tre memorinda figuro de roboto kondukas nin laŭ Danteska vagado suben, ĉasante tamen tute alian verkon el la monda literaturo. Post tiu ekskurso la leganto eble demandas sin kio kaj kiuj estaĵoj povos konservi kaj pluvivigi la homecon en malhoma socio.

García regalias nin per bukado da rakontoj ĝuindaj, pensigaj, amuzaj kaj teruraj. Eĉ se ni ne rekonas la geedzojn Bent-

ham kaj Byrd, renkontatajn transmonde, ni tamen ege ĝuas la ĝisoste anglan etoson en ilia hejmo. Kaj eĉ se ni ne komprenas la matematikajn formulojn de roboto, ĝia klopodo kompreni homajn sentojn tamen amuzas kaj eble maltrankviligas nin.

La lingvaĵo de *Kapturnoj* estas bona kaj flua, normala Esperanto. Pro la temo ĝi enhavas sufiĉe multe da vortoj novaj aŭ maloftaj, sed la plej multaj ŝajnas naturaj kaj pli-malpli kompreneblaj laŭ sia kunteksto. Piednote aperas kelkaj glosoj, tamen kaprice kaj maltroe.

Kvankam la stilo de García baze estas tre plaĉa, oni trovas jen kaj jen nekutimajn esprimojn kaj eĉ eraretojn, i.a. pri refleksivo, -igiliĝi, -italinta, kaj krome kelkajn france inspiritajn vortumojn. Fojfoje la leganto hezitas, ĉu temas pri intenca novaĵo (kiel *tanatologo*, *ontofanio*, *androido*),

eraro pri vortformo (kiel *ombiliko*, *momio*, *recensio*) aŭ simpla preseraro. Ĉi valora verko efektive meritis ke la eldonejo kaj aŭtoro havigu al ĝi pli detalan lingvan poluradon. Neniu el la nomitaj makuletoj tamen ĝenas la ĝuadon de la teksto.

Sume kaj resume, do, *Kapturnoj* estas tre leginda verko. Kaj leginte ĉi tiun novelaron, oni atribuas al la vorto "membro-abonanto" tute novan nuancon!

Sten Johansson · Svedio

LA ONDO DE ESPERANTO

ĈIUMONATA SOCI-KULTURA REVUO KUN LITERATURA SUPLEMENTO JARFINE

- ▶ TRA ESPERANTUJO: Faktoj, problemoj, komentarioj
- ▶ CIVILIZO: Kia estis, estas kaj estos la mondo?
- ▶ ESPERANTO: lingvo, komunumo, literaturo
- ▶ Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- ▶ MOZAĴO: konkursoj, kvizoj, krucvortenigmaj, humuro
- ▶ Ĉiujara proklamo de la Esperantisto de la Jaro

Abonebla kontraŭ 24 eŭroj ĉe UEA kaj landaj perantoj.
Provekezemplero ĉe RU-620077 Jekaterinburg-77, p.k. 67, Ruslando

Verko kiu vivas kun la tempo

Resurekto (1899). Lev Tolstoj (1828-1910). El la rusa trad. Viktor Sapoĵnikov. Jekaterinburg: Sezonoj, 2000. 368p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. € 24,00.

Iuj romanoj estas ŝate legataj nur kelkan tempon, ĉar iliaj artaj aŭ pensaj valoroj estas nur portempaj: tiel estas ekzemple ĉe aŭtoroj kiuj por vivteno akomodigeblas al la legantara bezono sia-tempa, aŭ politike al registaraj voloj de sia epoko.

Male, iuj romanoj supervivas siajn aŭtorojn kaj famas ne pro ĉi ties rango aŭ nobeleco. *Resurekto* de Tolstoj pruviĝas leginda tra 100 jaroj kaj tra la tuta mondo, ĝuste pro sia eterna artkaj socivaloro.

Arta valoro ekzistas en kreado kaj evolado. En *Resurekto* la intrigo estas linia kaj retrovida — tiaj metodoj diferencas de tiuj en la Tolstoja *Milito kaj Paco*, antaŭe verkita. La socia vivo malkovriĝas laŭ la observado kaj spertado de la protagonisto Neĥludov, kaj la detaloj komenciĝas in-



verse de la juĝado al la protagonistino Maslova, tiel ke la sociaj problemoj estas koncentre kaj distinge malkaŝataj, kaj la ŝanĝado de la psikologio estas taŭge priskribata. Tra la libro troviĝas riĉaj komparo kaj kontrasto de personaj aspektoj kaj ecoj kaj de cirkonstancoj kun psikologiaj — rimejoj lerte manipolataj de Tolstoj.

Signife *Resurekto* restas efika en nia nuntempo. Tio estas karaktero de verko vivanta tra historio. Nur la popoloj estas senmortaj generacion post generacio. Se verko estas verkata por aŭ pri popolo(j), ĝi estos ŝate legata por ĉiam. En la libro ni povas legi okazaĵon kvazaŭ ĝi okazus nun ĉe ni: virino perdis liberon pro maljusta juĝo de neatentemaj juĝistoj. Tiaj viktimoj troviĝas ĉiam ĉie. Tiaj juĝistoj neniam

pereos spite al la civilizacia evoluado. Tion ĉi Tolstoj antaŭvidis. Do, lia verko vivas kun la tempo.

Sed bedaŭrinde Tolstoj eraras pri tio ke malbonon oni povas venki per morala memperfektigo. Ĉu ni kredu ke ĉiuj juĝistoj senzorgaj rimorse agos iutage kiel Neĥludov? Ĉirkaŭ ni aperadas tiaj juĝistoj kreskantaj el antaŭe mizeraj popoloj, kaj iam popoloj emas maljuste agi kontraŭ popoloj. Tolstojismo ne kapablas solvi la socian problemon. Ni vidas: scienco evoluas, kaj malbono same. Ĉu ni povas esperi ke koruptiĝistoj tra la tuta mondo morale perfektigos sin kaj redonos sian kontraŭleĝan riĉaĵon al la popoloj?

La tradukon de Viktor Sapoĵnikov vi povas legi laŭ via propra plaĉo, ĉu vi estas tolstojisma, tia-juĝista, nehludoveska, maslovaeca... Ĉar la lingvo Esperanto ĉiam restas neŭtrala. Kaj la lingva stilo de Sapoĵnikov estas neŭtrala — nek fundamenta nek avangardega, do leginda de ĉiuj specaj esperantistoj. En la libro ne troviĝas vortoj Piĉ-ecaj, nek frazoj cerbumigaj. Kaj danke al la Notoj en la libro ni povas tralegi sen problemoj.

Tamen kelkaj etaj vortoj estas diskutindaj: "en la pordo" (p. 175, l. 7); "plena da popolo" (p. 174, l. 6), "plenaj da larmoj" (p. 249, l. 12).

Mao Zifu · Ĉinio

Abontarifoj 2001 de la Libroservo de UEA

(prezoj en eŭroj)

Revuo	n-roj jare	jara abono
Amuze (distro, enigmoj, ludoj)	6	18,00
Boletín (hispana)	5	26,00
Brazila Esperantisto (aere)	4	23,00
Bulgara Esperantisto	4	12,00
Debrecena bulteno (beletra, movada)	6	13,50
Dia Regno (KELI, aere)	6	14,00
Esperantisto slovaka	4	20,00
Esperanto aktuell (germana)	6	15,30
Esperanto, L' (itala)	9	26,00
Esperantolehti (finna)	6	13,60
Esperanto sub la Suda Kruco (aŭstralia-novzelanda, aere)	6	24,00
Espero Katolika (IKUE)	6	29,50
Espero, La (sveda)	6	20,00
Fonto (literatura, aere)	12	36,00
Franca Esperantisto	11	32,00
Gazeto, La (kultura)	6	27,00
aerpoŝta aldono	4,00	
Heroldo de Esperanto	16	29,00
aerpoŝta aldono	16,00	
ICEM-Esperanto (Freinet-pedagogio)	4	18,30
Informilo por Interlingvistoj	4	6,80
Internacia Pedagogia Revuo	4	18,00
Jaro, La (agendo)	1	5,00
aerpoŝta aldono	1,00	
Juna Amiko (por lernejoj)	4	10,80
Kancerkliniko, La (ajnista)	5	20,00
aerpoŝta aldono	3,00	
Komencanto (facila, amuza, instrua)	8	13,00
Kosmos (filozofia)	2	8,00
Language Problems and Language Planning institucioj	3	50,80 118,90
Lanterno Azia, La (korea, aere)	6	12,00
Literatura Foiro	6	27,00
aerpoŝta aldono	12,00	
Litova Stelo	6	14,00
Medicina Internacia Revuo (aere)	3	13,60
Monato (novajmagazino)	12	39,00
aerpoŝta aldono	5,00	
Norvega Esperantisto	6	10,00
Ondo de Esperanto, La (rusa)	12	24,00
Oomoto (religia/kultura, aere)	2	13,80
Rok-gazet' (muzika; abono 3 jaroj)	1	18,00
Scienco kaj kulturo	6	25,00
Sennaciulo / Sennacieca revuo	12	51,70
Simpozio (filozofia)	2	8,00
Starto (ĉeĥa)	6	9,00
TEJO tutmonde	4	9,50
Tempo (kroata)	4	7,50

Por mendoj de klientoj loĝantaj en Eŭropa Unio aldoniĝas imposto de 6%.

Recenzoj


Gramatiko

Nederlanda vojo al "plena posedo"

Esperanto: Grammatica met oefeningen. Roel Haveman (1963), Arjen-Sjoerd de Vries (1964). Bussum: Coutinho, 1999. 446p. 25cm. Kun kompaktdisko. Bind. € 38,40. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries verŝajne restas konataj al pluraj nederlandaj komencintoj, kiuj lernis de ili en renkontiĝoj aŭ per rubrikoj en Esperanto-gazetoj. En 1999 fine aperis ilia longe atendita lernolibro, eĉ ĉe renoma tutlanda eldonejo. Per tio ŝtopiĝas breĉo, ĉar antaŭe haveblis nur malnoviĝintaĵoj el la postmilitaj jaroj. La konsiderinda prezo rekomendas la dikan verkon precipe al tre-interesiĝuloj, kiuj pro la inkluzivita kompaktdisko kaj la ekzercoj disponas pri kompleta gvidanto al la lingvo-posedo, eble eĉ plena posedo.

Kvankam la aŭtoroj prezentas Esperanton enkonduke kiel "facilan" kaj "regulan", la lecionoj ne timas eliri de reala lingvo-uzo anstataŭ de la idealaĵo en tradiciaj lerniloj. Leganto lernas eĉ pri la problemoj de supersignoj kaj la mal- kaj avantaĝoj de solvoprovoj. La parto pri elparolo ekzercas ankaŭ tiujn sonojn kiujn multaj aliaj aŭtoroj taksas memkompreneblaj. Sed admono ke "apud" finiĝas ankaŭ sone per "d" kaj ne per "t", utilis ankaŭ por germanlingvaj lernolibroj. Salutinda estas plue la rekomendo de koncernlingvaj vortaroj,



anstataŭ kiel kutime apendici modestan vortliston.

Malmulteco de ilustraj trajtoj emfazas la seriozan, tamen ne tro-seriozan stilon. Laŭdindas ke tiuj malmultaj bildoj montras precipe aferojn pri kies ekzisto lernanto ne dubas ĉe aliaj fremdaj lingvoj, sed kiujn prezenti endas ĉe Esperanto: paĝon el PIV, aron da libroj kaj gazetoj, foton el IS (tamen tre malhelan). Amuze la aŭtoroj enkondukis la Esperan-

to-himnon: per la tasko serĉi la adasismojn en "La Espero". (Estas kvin el dekdu rimoj!) Tio kaj lernfrazoj kiel "la genia Zamenhof" aŭ "nia urbestro parolas Esperanton" verŝajne havas la taskon jam iomete mildigi la ŝokon renkontante tiaĵojn en la reale ekzistanta Esperantio.

Iom mirigas ke nur nederlandanoj parolis por la aldonita KD, sed ĝenerale la faro kaj elekto de tekstoj kaj muzikoj tre konvenas.

Ĉi-kaze vere indus la financa subteno de la asocio Esperanto Nederland. Kaj la vivproksimeco de tiu ĉi lernolibro kaj ĝia profesieca apero certigas ĝian firman lokon en la nederlanda Esperanto-agado de multaj venontaj jaroj.

Ziko Marcus Sikosek · Germanio

KLEKS en sia nigra serio prezentas...

MARTA

de Eliza Orzeszko, en traduko de Zamenhof

Junulino luktas por digna vivo en pasint-jarcenta Pollando. "La rakonto progresas rapide, kaj la leganto nepre enplektiĝas en la tragedian rakonton... ne nur specimeno el la frua historio de Esperanto" (Anna Löwenstein).

Bielsko-Biała: KLEKS, 1999 (5-a eld.). 256p. Bindita. € 12,00. Triona rabato ekde tri ekz. ĉe la Libroservo de UEA.



Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Averto. *La Epoko: Kajero 143(14).* Ichok Lejbuŝ Perec (1852-1915). El la jida trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1993. 12p. 28cm. Novelo de unu el la tri fondopatroj de la juda literaturo, moderna romantikisto. € 3,30.

Concise Esperanto and English Dictionary. *Teach Yourself Books.* J. C. Wells (1939). London: Hodder & Stoughton, 1999. 9+419p. ISBN 0 340 58354 1. 20cm. Esperanta-angla (9000 vortoj), angla-Esperanta (19500 vortoj). Sama kiel la unua eldono (1969). € 25,80.

Ĉu ankoraŭ ne pli supren... *La Epoko: Kajero 143(19).* I. L. Perec. Vidu ĉe *Averto*. 11p. € 3,30.

De la absurdo al la ŝanco. Ludomir Karcz (1928). Horodek: Monda Universala Pac-Akademio, 2000. 76p. 21cm. Artikoloj, leteroj, intervjuoj ktp rilate al nuklea malarmado. € 6,00.

Esperanto per iom malpli ol 500 vortoj. A. Kerbel (1930). Ĥajfo: la aŭtoro, 1999. 254p. 21cm. Ilus. Ringe bindita. Lernilo kun facilstila rerakonto de *Trezorinsulo* de Stevenson. € 7,50.

Fremda birdo, La. *La Epoko: Kajero 143(40).* I. L. Perec. Vidu ĉe *Averto*. 10p. € 3,30.

Gaston Waringhien 1901-1991. *Heroldo de la internacia lingvo.* André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 2000. 79p. ISBN 2 906134 49 X. 21cm. Dulingva: E-franca. Konciza biografio kun multaj faktoj,

prezentanta ĉiujn agadterenojn de la eminentulo. € 8,70.

Internacia Kongresa Universitato. *Tel-Avivo 26 julio - 1a aŭgusto 2000.* Red. Michela Lipari. Rotterdam: UEA, 2000. 94+6p. 30cm. Ringe bind. Prelegoj de H.

komparaĵo. Prezento de Kalocsay kiel proza verkisto kaj tradukinto. € 15,00.

Tamen estas necese preĝi. *La Epoko: Kajero 143(15).* I. L. Perec. Vidu ĉe *Averto*. 8p. € 3,00.

Tria testamento, La. *La eterna mondbildo 3-4.* Martinus (1890-1981). El la dana trad. Ib Schleicher. Kopenhago: Martinus-Instituto, 1999. 214+19p. ISBN 87 575 0128 9. 25cm. 19 koloraj ilustraĵoj tupaĝaj. "Logika vivklarigo", "natura daŭrigo de religioj". € 33,00.


Vortareto de kombineblaj vortoj. *Parto A-K.* Matubara Hatiro (1922). Osaka: Osaka E-Societo, 2000. 606p. 26cm. Riĉa kolekto — fakte vortarego — de fiksj kaj oftaj esprimoj, kiuj prilumas la sencaron de la kap-vortoj. Kun japanaj tradukoj. Internacie uzinda. € 37,80.

KOMPAKTAJ DISKOJ


Nia norda urbet' festas verdan someron. *Kantoj de OkSEJT-39, Tiĥvin 1999.* G.

Arosjev, M. Bronŝtejn, O. Dadaev, Jomart kaj Nataŝa k.m.a. Tiĥvin, 2000. 74 min. Kantoj plejparte blusaj. € 15,00.

Preĝo sub la verda standardo. *Kantas Remigiusz Kossakowski, baritono.* Akompanas la ensemblo Akordo. Tekstoj de Zamenhof, Kossakowski k.a. Muziko de Kossakowski, Mozart, Bizet, Rossini k.a. Varsovio: KIK, 2000. 18 kantoj 60 min. Dediĉita al la partoprenantoj de la Tel-Aviva UK. € 13,50.



La plej belaj eroj de la novembra librorikolto



Tonkin, V. Barandovská-Frank, E. Bojaĝieva, V. Benczik, A. Wandel, H. Eichhorn kaj U. Lins. € 7,80. Triona rabato ekde tri ekz.

Kolero de virino, La. *La Epoko: Kajero 143(16).* I. L. Perec. Vidu ĉe *Averto*. 12p. € 3,30.

Omaĝe al Kálmán Kalocsay. *Kvara volumo.* Ada Csiszár (1930). Budapest: KAL-Ĉi Dokumentaro, 2000. 75p. 30cm. Ringe bind. Kvara volumo de ampleksa biografio

Laste reaperis

La Libroservo de UEA lastatempe akiris multajn titolojn, kiuj dum longa tempo estis ekster la merkato. De kelkaj el ili la stoko estas limigita kaj fruaj mendoj tial konsilindas. Kiel kutime, sesona rabato ekde 3 ekz. de la sama titolo:

Batalo de l'vivo, La. Dickens. Tr. Zamenhof. 1982. 93p. 6,00
Elektitaj fabeloj. Fratoj Grimm. Tr. Kabe. 1985. 199p. 13,50
El la maniko. Reto Rossetti. Novelaro. 1984. 221p. 12,00
El parnaso de popoloj. A. Grabowski. 1983 (repr.), 236p. 16,50
Ezopa saĝo. K. Kalocsay. 77 versaj fabeloj. 1978. 127. 6,00
Forkaptita. R.L. Stevenson. Tr. Goodheir. 1989. 181p. 12,00
Infana raso, La. William Auld. Fama epopeo. 1980, 101p. 7,50
Klaĉejo. K. Piĉ. Avangarda romano. 1987. 188p. 18,00

Nokta flugo. Saint-Exupéry. Tr. Vatré. 1983. 66p. 12,00
Poezia arto, La. Baldur Ragnarsson. Eseoj. 1988. 55p. 6,00
Poŝatlaso de la mondo. 1971. 41 mapoj, 55p. da indekso. 7,50
Pri Esperanta tradukarto. Fernando de Diego. 1979. 70p. 6,00
Pri internacia lingvo dum jarcentoj. Dratwer, 1977. 332p. 12,00
Pri literatura kritiko. Fernando de Diego. 1984. 70p. 7,50
Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. 1987. 790p. 54,00
Streĉita kordo. K. Kalocsay. Fama poemaro. 1978. 196. 9,00
Suferoj de la juna Werther, La. Goethe. 1984. Bind. 92p. 16,50
Tero de la homoj. Saint-Exupéry. Tr. Vatré. 1985. 152p. 18,00
Vereco distro stilo. W. Auld. 50 E-romanoj. 1981. 101p. 8,40
Vole... novele. R. Schwartz. Rakontoj. 1987. 192p. 12,00
Zamenhof Creator of Esperanto. M. Boulton. 1980. 223p. 12,00

NAVIGE

TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



AFRIKO

Afrika Agado de UEA: http://perso.wanadoo.fr/eric.coffinet/Afrika_Agado.html, kun multaj ligoj, i.a. al

Universala Kultura Servo, en Malagasio: <http://takelaka.dts.mg/uks/>

E-Asocio en Suda Afriko: <http://www.geocities.com/Athens/Forum/1122/>

Afrik'Naturo en Kamerunio, "neregistara organizo, kiu zorgas pri sano per naturo": <http://www.africnature.com/esperanto.htm>

ARTO

Kavlan ekspozicias siajn akvarelojn: <http://perso.infonie.fr/jjpc/exposition.htm>

LIBROJ, LITERATURO

Tradukoj de Christian Richard el Lautréamont, Jarry, Schwitters k.a.: <http://www.geocities.com/Athens/8029/>

Hinda literaturo (Aniruddha Banhatti): http://www.geocities.com/ni_sep/nisep01.html
kaj http://www.geocities.com/anyabanya_2000/

Vortareto eŭska-E-eŭska: <http://esperanto.online.fr/esperant61/esperu0.htm>

Eldonejo de Christian Bertin (Francio): <http://www.ifrance.com/bertin/>

Eldonejo Akileo (vidu *Aelita*, okt., p. 175): <http://akileo.bizland.com/>

Naturkuracado 2000 (vidu okt., p. 175): http://www.mz-verlag.de/INA/Publikationen/INA_jarlibro_2000_online.pdf

MOVADO

Manifesto de Prago en 22 lingvoj: <http://www.esperanto.se/dok/manifesto.html>

UEA-komisiono por Ameriko: <http://www.geocities.com/espameriko>

TEJO: <http://esperanto.org/internacia/TEJO/>

Zamenhof / Esperanto-Objektoj, laŭ la libro *Monumente pri Esperanto*, ĉe la Lodza

Filio de Pola E-Asocio: <http://ikki.com.pl/esperant/zeo/>

REVUOJ, INFORMILOJ

Aktualaĵoj el Ĉinio: <http://www.china.org.cn/world/index.htm>

ILEI-bulteno (rapidaj informoj instru-temaj): <http://esperanto.nu/ileibulteno/index.html>

Penseo, beletra revueto (hejmpaĝo de MAO Zifu): <http://users4.50megs.com/zfmao>

TURISMO

La urbo Colmar (Alzaco, Francio): <http://www.multimania.com/tourismecolmar>

Orbis Pictus, Esperanta entrepreno: <http://users.iol.it/orbis pictus/>

Urbaj informoj pri Malbork (Pollando): <http://www.malbork.pl/>

Bjalistoko, oficiala paĝaro de la urbo: <http://www.city.bialystok.pl/espera.htm>

Ministerio de la germana federacia lando Ŝlesvig-Holstinio pri kamparaj regionoj, landplanado, agrikulturo kaj turismo: <http://www.schleswig-holstein.de/landsh/mlr/>

DISSENDOLISTOJ

Akademio de E-o (nur por listanoj): <http://www.egroups.com/group/esperanto-akademio/>

Anekdotoj (nur por listanoj): <http://esperanto.anekdot.listbot.com/>

"Komune ellaborataj plibonigoj" al Esperanto estas diskutataj ĉe: <http://www.egroups.com/group/esp-novo>

Kaj plue...





BENINO-NIGERIO: Vizito

Gviditaj de Jean Codjo, direktoro de la Centro Esperanto-Afriko en Cotonou, kvin beninaj e-istoj ĉeestis la 17-an de sep. en Niĝerio la oficialan inaŭguron de Badagry E-Movado (BEM). Post bonveniga parolado de vicgrupestro Mikpoevevo K., la estro, s-ro Vidosodji, prezentis la historion de la E-grupo, kaj petis lernomaterialojn kaj financon helpon. Codjo prelegetis pri UEA kaj pri la projekto "Prioritato Afriko". Esperanto-Afriko donacis al BEM aron da lernolibroj kaj 30 000 frankojn, kaj promesis subvencii kvar e-istojn el Bada-

gry por ĉeesti la 8-an Togolandan E-Kongreson en decembro.

Je la sepa horo la beninanoj forlasis siajn gastigantojn, ĉar pro diversaj danĝeroj ili devis retransiri la landlimon antaŭ la nokto. (C. Fabossou)

Mao Zifu



ĈINIO: Simpozio pri Mao

Unuafoje en Ĉinio oni dediĉis simpozion al la verkaro de unuopa esperantisto: la poeto MAO Zifu. Kunvenis en Changde, en la tagoj 14-16 aŭg., ĉ. 40 esperantistoj, i.a. la beletra korifeo Guozhu, la prezidantino de Ĉina E-Ligo, TAN Xiuzhu, kaj Liu Junfang de Ĉina Radio Internacia. Ĉeestis lokaj estroj kaj anoj de

la provinca registaro.

En sia prelego Guozhu emfazis ke neniu ĉina e-isto, krom Armand Su, tiom publikigis kaj vekis atenton ekster Ĉinio kiom MAO Zifu.

La provinca televido faris programon pri Mao kaj Esperanto, en kiu Mao partoprenis la 24-an de sep. kune kun 50 e-istoj en la provinca ĉefurbo Changsha.

Vidu fotojn ĉe <http://users4.50megs.com/zfmao>.

GERMANIO-RUMANIO: Ĝemele

Post leteraj kaj telefonaj instigoj de Evelin Geist el Forchheim (Germanio), fondiĝis nova E-grupo en ĉi ties ĝemelurbo Gherla (Rumanio). Post ok monatoj da lernado 20 e-istoj el Gherla jam venis al Forchheim, kaj fine de oktobro Geist reciprokis la viziton. Vizitu <http://www.fen-baynet.de/~ea1448>.



Maskerado angle

La eldonejo Canongate lanĉis la 3-an de oktobro en Londono la libron *Maskerado, Dancing Around Death in Nazi Hungary*. Temas pri eldono, tradukita kaj editorita de Humphrey Tonkin, de *Maskerado ĉirkaŭ la morto de Teodoro Ŝvarc (Soros)*, la mecenata fondinto de *Literatura Mondo*. La verko, kies eldonraĵoj estas jam venditaj por Germanio, Turkio kaj Usono, povas veki vastan intereson i.a. pro tio ke la filo de Ŝvarc, George Soros, estas mondkonata financisto.

Oz kaj Alicoj en TTT

Verkoj de Lewis Carroll kaj ĉiuj 14 romanoj de L. Frank Baum en lia serio pri la *Mirinda Sorĉisto de Oz* troveblas ĉe <http://www.geocities.com/Athens/Oracle/9067/>, en traduko de Donald Broadribb. Eldonistoj emaj aperigi libro(j)n el la Oz-serio, kontaktu donaldbroadribb@mac.com.

Revelacio en Esperanto

Espero Katolika tre rapide esperantigis "la trian parton de la sekreto de Fatimo", diskonigita de Vatikano la 26-an de junio. La maja-junia n-ro aperigis la dokumenton, "privatan revelacion", kiun "kredantoj povas libere akcepti aŭ rifuzi".

NEDERLANDO: ZEO REVIVAS POST 67 JAROJ

En Nederlando estas nun bela modo renovigi Zamenhof/Esperanto-objektojn. Post la re-inaŭguro de la E-monumento sur la insulo Texel (vidu jul.-aŭg., p. 137), sekvis rebeligo de la historie unua (1933) E-monumento de la lando, en la urbo Bergen op Zoom.

La 9-an de septembro alvojaĝis ĉirkaŭ 150 esperantistoj por la inaŭguro fare de Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof, kiu memorigis kiel lia

onklino Lidja Zamenhof staris samloke la 29-an de julio 1933. Interese ke ĉeestis ankaŭ la kreinto de la artaĵo, la itala skulptisto Mario Santuz, kiu en 1933 aĝis nur 17 jarojn. Antaŭ kaj post la inaŭguro okazis akcepto resp. festa tostado en la urbodomo, kiujn spicis prelegoj kaj paroladoj.

La landa asocio Esperanto Nederland kaptis la okazon por tuttaga informado amuza kaj luda, kiun kompletigis senpaga Esperanto-leciono de Atilio Orellana Rojas en la urba biblioteko. Publike kantis la E-korusoj Akordo kaj Malvo.

(H. Bakker,

De stem v. Bergen op Zoom)





AULD: Famulo kaj FAME

Kadre de solena matineo en la urba biblioteko la 15-an de okt., FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj transdonis la Sepan Esperanto-Kultur-premion de la urbo Aalen al William Auld (76-jara la 6-an de novembro). Ĉar lia sanstato ne permesis alvojaĝi, la premion (10 000 germanaj markoj) transprenis por li Michael Scherm, prezidanto de la germana ILEI-sekcio. Laŭdparolis d-ro Werner Bormann, prezidanto de FAME-fondaĵo (kaj prezidinto de la Akademio) — germanlingve pro la ĉeestantaj reprezentantoj de la publika vivo. (K. H. Schaeffer)

POMPILIO: MEMORMARKOJ

En la aŭkcio dum la UK (vidu okt., p. 165), folio kun glu-



Ambaŭ fotoj: UEA/F.L. Vauthier



Humphrey Tonkin aŭkcias la glumarkaron. Maldekstre, Glauco Pompilio ĝojas.

markoj de la neokazinta Tel-Aviva UK (1967) estis vendita por € 43 al Glauco Pompilio (64-jara), kiu havas plej personan memoron pri la kongresaj preparoj de tiu jaro: en 1967 li estis la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA.

CHANG: Familiaj ligoj

Lige al la nunaj renkontiĝoj inter familianoj disigitaj inter

Koreio Norda kaj Suda, ofte eblis legi en gazetoj la nomon de d-ro CHANG Choong Shik (68-jara), prezidinto de Korea E-Asocio kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Kiel

prezidanto de la (suda) Korea Ruĝa Kruco, d-ro Chang gvidis la grupon de familiaj vizitantoj el Suda al Norda Koreio. (Lee C-Y.)

KONISI: Premio Ossaka

Akademiano, prof. KONISI Gaku (66-jara) ricevis en la 87-a Japana E-Kongreso (13-15 okt., Kumamoto) Premion Ossaka, la plej prestiĝan por la japana e-istaro, pro sia granda kontribuo al la esperantigo de japanaj noveloj kaj kantoj kaj, plej elstare, de *Neĝa lando* de la Nobel-premito KAWABATA Yasunari kaj fabeloj de MIYAZAWA Kenzi. Konisi nun gvidas teamon por nove redaktata E-japana vortaro.

STEELE: Per unu voĉo pli

Pro sia libro *Falantaj muroj* (apr. '99, p. 73), Trevor Steele (60-jara) gajnis la ĉi-jaran premion de OSIEK, kiun la membroj de ĉi tiu kultura societo aljuĝas per voĉdono. Steele montriĝis supera al William Auld per unu voĉo pli. (M. de Zilah)

KOMINKOWSKY: REFREŜIGA VIZITO

En la lasta tago de la Tel-Aviva UK ni povis saluti la plej aĝan partoprenanton, la 96-jaran Itzhak Kominkowsky. Li estis membro de UEA jam en Pollando, de kie li enmigris Israelon en 1950. Pli frue aktiva kiel lingvisto, s-ro Kominkowsky bone konas sep lingvojn, kaj li ĝojis pri la okazo refreŝigi sian Esperanton.



UEA/F.L. Vauthier

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifen de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

KOMENCANTO — neordinare interesa internacia gazeto, pk 132, Ekaterinburg, 620041 Ruslando. Specimeno: 2 IRK.

SEMINARIOJ POR ESTONTAJ E-instruistoj 23.12.2000 kaj 17/18. 02.2001, ktp en Herzberg, Germanio. Kontakto: ☎/ 05521-1363.

UNU EL LA PLEJ AKTIVAJ en Ruslando, Krasnojarska E-ista Klubo 25-jariĝos la 25-an de nov. Ni ŝatus ricevi gratulojn el la tuta mondo: ✉sapphire@ns.kgtu.runnet.ru.

E-ISTAJ MEDICIN-STUDANTOJ diverslandaj: interŝanĝu kun ni ideojn pri projekto. Sandra Burges Roca, Avda. Gral. Flores 2125, UY-11800 Montevideo, Urugvajo; ✉sburges@fmed.edu.uy.

MAGISTRO PRI ESPERANTO kun kvalifiko de mezlerneja instruisto aŭ filologo de E-lingvo kaj literaturo vi estos post trijara kurso en Univ. ELTE, sen devo restadi en Budapeŝto, krom 9 tagoj, 2 fojojn jare. ELTE, E-fako, Piarista köz 1, HU-1052 Budapest, Hungario; ✉hekaszs@freemail.c3.hu.



ĜUSTIGO

En julio (p. 138, "Turismo: MT 30-jara") ni nomis Mondan Turismon "Esperanta agentejo". Ĝi estas fakte faka asocio aliĝinta al UEA.

Frua pago de la kotizo por 2001 certigas kontinuecon en la ricevado de UEA-eldonaĵoj kaj helpas la laboron de la Centra Oficejo!

EVENTOJ La plej ofta E-gazeto!

pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario



FRANCIO: ARTE kaj plaĉe

Vespera elsendo de la franca-germana kultura TV-kanalo ARTE (4 jul.) pri "La utopioj — iu deziro pri perfekteco" donis pri E-o, bedaŭrinde iom mallonge kompare kun aliaj "utopioj", pozitivan, junecan, ekvilibrantan, seriozan kaj modernan bildon. (H. Masson)

GERMANIO: E-o en Frankfurto

La fama Internacia Libro-Foiro en Frankfurto ne malhavis librojn Esperantajn: en ĝia pola halo, la eldonejo KLEKS de Georgo Handzlik prezentis i.a. sian "nigran serion" (vidu p. 194), kun *Marta de Orzeszko* kaj *Higieno de l' murdisto* de Nothomb. La KLEKS-budo ankaŭ informis pri E-o. (NUN)

HUNGARIO: Reala miraklo

En la rekte elsendata, duonhora programo "Realigintaj mirakloj" de la komerca TV-kanalo ATV, (16 sep.), László Szilvási kaj Zsófia Kóródy respondis al demandoj en ĉefa spektotempo.

- Kultura E-Asocio produktis por Hungario modernan flugfolion, merkatiĝe/reklamteknike pripensitan. La unuan stokon de 5 000, elĉerpitan en unu monato, sekvis represo de 10 000 ekz.

ISRAELO: Hungarlingve

La taggazeto de hungarlingvaj israelanoj, *Új Kelet*, aperigis la 4-an de aŭg. tutaĝan artikolon bazitan sur intervjuo kun HEA-prezidanto György Nanovfszky.

URUGVAJO: Ŝalom Esperanto

La 1-an de okt. tutlande videbla, 10-minuta intervjuo en la elsendo "Ŝalom Uruguay" (de la juda komunumo), pri E-o kaj la ĵusa UK, tuŝis demandojn pri la lingvo, ĝia kreinto, kaj pri la nuna situacio de la E-movado en Urugvajo kaj tra la mondo. (S. Falchi)

SOCIÉTÉ • CULTURE

«L'anglais est la langue la plus inadaptée à la communication internationale»




SVISLANDO: Tempo por E-o

En la frandlingva gazeto *Le Temps* (20 sep.) Anna Lietti, fakulino pri plurlingva edukado, intervjuis kun simpatio Claude Piron kaj la familion Bélisle en La Chaux-de-Fonds, kie patrino Marion parolas en Esperanto kun sia 2-jara filo Romain. "La e-ista kontribuo al la lingva debato estas kaj originala kaj racia" — konstatas la enkonduko. (H. Masson)

VIZITU VIAN PROPRIAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 25-an de novembro 2000 (10h00 - 17h00)




- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj

Speciala gasto:
SPOMENKA
ŜTIMEC



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhanta prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj



ELEKTO DE KOMITATANOJ B DE UEA

En 2001 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA. Parto de tiu procezo, kiu kulminos en la UK en Zagrebo, estos elekto de komitatanoj B kiel reprezentantoj de la individuaj membroj (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidebla nombro da IM je 31 decembro 2000 oni elektos sep komitatanojn B por la periodo 2001-2004.

La Ĝenerala Regularo (art. 8) preskribas: "Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas

proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn."

Kompletaj proponoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA en Roterdamo ĝis la 28-a de februaro 2001. Validaj estos nur skribaj dokumentoj kun originalaj subskriboj (t.e. ne telefaksoj aŭ retmesaĝoj).

Ĉiu kandidato devas esti individua membro de UEA dum du jaroj antaŭ la elekto (t.e. 1999-2000) kaj kompreneble kotizi ankaŭ por 2001. Salajrata UEA-oficisto ne rajtas esti komitatano. Jama komitatano estas reelektebla kondiĉe ke en la periodo 1995-2000 li/ŝi ĉeestis almenaŭ unu komitatkunsidon. Oni tamen memoru ke la elektoj estas ŝanco alporti freŝajn fortojn kaj ideojn al la gvidado de la Asocio.

Se ne estos pli ol sep validaj kandidatoj, oni konsideros ĉiujn elektitaj. Se ili estos pli multaj, la individuaj membroj ricevos en aprilo voĉdonilon por elekti siajn reprezentantojn per baloto.

Uzu vian demokratian rajton reprezentiĝi en la supera gvidorgano de UEA!

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro

Suzsa BARCSAY (1942-2000), iama delegito pri E-instruado, LKK-ano de la 68-a UK (1983), forpasis la 29-an de septembro en Budapeŝto. Ŝi esperantistigis en 1971 kaj, studinte en la E-fako de Universitato ELTE, instruis tie metodologion ekde 1988. Kiel landa inspektoro edukministeria (de 1982) kaj tutlanda konsilanto pri E-metodologio (de 1988), ŝi zorgis ke Esperanto restu instruebla ĉiunivele en la hungara lerneja sistemo. Dum du jardekoj ŝi organizis la ĉiujarajn ŝtatajn konkursojn por bazlernejoj. Ŝi mem gvidis multajn kursojn, ankaŭ eksterlande (Finnlando, Bulgario), kaj motoris sukcesan serion de internaciaj metodikaj seminarioj. Aktiva en ILEI kiel hungara sekiestro (1976-84), estrarano kaj komisiito (1991-95), ŝi prizorgis ĉi ties konferencojn kun granda atento al kvalita faka programo. Ŝi iniciatis kaj trifoje gvidis la ILEI-Gimnazion, studsemajnon por gejunuloj. Ŝi estris (1987-90) la lernejan agadon de Hungara E-Asocio kaj estis ties vicprezidanto pri instruado kaj ekzamenoj.



Arkivo de UEA

Maurice FENEYROL (1924-2000), iama delegito pri elektrotekniko, dumviva membro de UEA kaj de Unuiĝo Franca por E-o, granda mecenato de la E-movado, forpasis junie en La Garde (Francio).

Waldir LISBOA ROCHA (1931-2000), delegito pri odontologio en San-Paŭlo (Brazilo), forpasis lastatempe.

Yukiyosi MURAMATU (1940-2000), dumviva membro, iama delegito pri radioamatorismo en Uenohara (Japanio), forpasis antaŭ nelonge.

Solen' GASPARD (1955-2000), E-aktorino kaj reĝisoro, mortis la 12-an de oktobro. Solen', kies gepatroj estis blindaj e-istoj, jam infanaĝe vizitadis diversajn E-aranĝojn. Ekde 15-jara aĝo ŝi dediĉis sin al teatro.

De 1976 en Teatro Esperanto de Parizo (TESPA) ŝi ludis ĉefrolojn, zorgis pri dekoroj, kostumoj, son- kaj lum-tekniko, kaj reĝisoris i.a. *Andromaka* de Racine (1976), *La justuloj* de Camus (1977), *La*



Arkivo de UEA

kalva kantistino de Ionesco (1978) kaj *La fatomaŝino* de Cocteau (1979). Ŝi aktivis ankaŭ en la E-kabaredo La Ruza Kruĉo (1978-80). Forlasinte Parizon en 1980, ŝi fondis kun Arno Lagrange la teatron Krizalido, en kiu ŝi surscenigis dulingve i.a. *Ĉu Dio bojas?* (1981) de Boyer, *La evento* (1982) de Foissy kaj *Soleco* de E. Lapenna. En 1987 ŝi turneis kun *La amanto* de H. Pinter kaj *La plezuro disigi* de J. Renard. Ŝi mem verkis kaj de 1989 prezentadis *Meluzina*, lastfoje en la Montpeliera UK. Ŝia lasta E-prezentaĵo estis *Lasu neĝon fali* (laŭ P. Dupoyer), kiun ŝi solfoje ludis en KAFE (Tuluzo, julio 2000).

Anton ZACHARIÁŠ (1939-2000), e-isto ekde la jaroj 60-aj, mortis la 13-an de septembro en Košice (Slovakio). Unu el la plej bonaj E-instruistoj laŭ la rekta metodo, li estis populara pro gvido de kursoj vaste tra Eŭropo, de Litovio ĝis Hispanio. Ekde 1972 li regule instruis en Someraj E-Lernejoj en Slovakio, kaj lastfoje li gvidis internacian kurson por progresintoj unu monaton antaŭ sia forpaso, en Poprad. Regula kontribuanto al *Esperantisto Slovaka*, li aktivis de plej loka ĝis internacia skalo kaj ĝis 1994 laboris profesie en Slovakia E-Asocio.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokkazajn servojn kaj publikaĵojn.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependeryby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itellcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ mc8750@mlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen

55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ tacuo@oomoto.or.jp.


Observanto de TEJO: d-ro Sjoerd G. Bosga, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio; ☎ +46/21/417-045; ☐ sjoerd@esperanto.se.

Observanto de ILEI: s-ro Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ☎ +36/23/364-198; ☐ Stefan.MacGill@galamb.net.

OMAGE AL AULD KAJ BOULTON

En 1999 William Auld kaj Marjorie Boulton festis sian 75-an datrevenon. Okaze de la jubileo UEA donacis al ili festlibron, en kiu pluraj kontribuajloj prilumas ilian verkistan karieron kaj analizas iliajn verkojn.

Aliaj eseoj traktas aktualajn temojn de la movada kaj kultura vivo de Esperantujo.



Kontribuis V. Benczik, G. Berveling, W. Bormann, J. Camacho, P. Daŝgupto, S. Fiedler, P. Gubbins, T. Huĝimoto, R. Jaderstrom, E. de Kock, A. Korjenkov, Laŭlum, Mao Zifu, G. Mattos, S. Maul, A. Montagut, S. Pokrovskij, B. Ragnarsson, M. de Seabra, G. Silfer, H. Tonkin, L. Trifončovski kaj J. Wells. Kun la bibliografioj de Auld kaj Boulton fare de C. Cimpa.

LINGVA ARTO. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Red. Vilmos Benczik. Rotterdame: UEA, 1999. ISBN 92-9017-064-6. 5+217p. 21cm. Prezo: € 16,50.

Eltondu el via Jarlibro la lastan paĝon



**10%
RABATO!**

kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA!
Ĝi ja estas kupono, kiu rajtigas vin ĝis la 31-a de dec. 2000 mendi kion ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado



Rotterdame: UEA, 1995. Serio Konsilaroj por Aktivuloj n-ro 2. 53 p. Prezo: € 3,30. Triona rabato ekde 3 ekz.

Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj rakontoj sur pli ol 400 paĝoj...



"Unika legolibro, plej bonveniginda kaj rekomendinda al ĉiuj studentoj de la Internacia Lingvo."

Baldur Ragnarsson

Rotterdame: UEA, 1993 (dua korektita eld.). 431p. 21cm. Prezo: € 16,20 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Humphrey Tonkin, Frank Nuessel, Mark Fettes.

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519, Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 50,80 eŭroj
Institucia abono: 118,90 eŭroj

Abonu pere de la Libroservo de UEA.


ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



KSM

Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio



ĈU NI SERĈAS VIN?

Multaj esperantistoj membriĝus en UEA, se iu proponus al ili tion kaj ricevus ilian kotizpagon.

Tial UEA densigos la reton de kotizperantoj.


Skribu al la Direktoro de la CO, se ĝuste vi estas unu el la iniciatemuloj, kiujn ni serĉas!

UEA

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam, Nederlando

+31 10 4361751 uea@inter.nl.net



FESTU TINĈJON EĈ 71-JARAN!

De kiam la detektiveto debutis en 1929, vendiĝis milionoj da *Tinĉjo-bildstrioj* en pli ol 32 lingvoj. La du Esperantajn titolojn oni jam kredis elĉerpitaj, sed nia *Libro-servo* akiris stokon de La nigra insulo; ĝi estas nun ties ĉefa distribuanto.

La nigra insulo. Hergé. Trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62p. 30cm. € 10,00.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŜIAKTO

estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŜIAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 2001 **KŜIAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.




ABONTARIFO 2001

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugallio	3200 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2000 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	27 dolaroj	Usono	18 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

ENKONDUKO AL DEMOKRATIO



Du elstaraj britaj fakuloj klarigas en ĉi tiu gvidilo de Unesko okdek el la plej premaj demandoj pri la esenco, celoj kaj funkciado de demokratio. La demandoj estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj kaj

ilia defendado; demokratia socio; la estonteco de demokratio. Bonega kaj klara enkonduko en la plej gravan politikan koncepton, uzebla kiel lernolibro aŭ baza konsultlibro. Bela grafika vesto kun spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉef-desegnisto de la franca ĵurnalo *Le Monde*.

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj. David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000. 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: € 9,90.